


juna amiko

novembro 2021 • n-ro 4/2021 (169)



△ *Interkultura Mondo*: Kie troviĝas paradizo...

- En Derbento, Dagestano. Foto: Aleksej Salomátov.

Konversaciaj temoj: Sciencfikcio! *Ekologio*: EKO-Espero.

Naturo: Ni savu abelojn. Fluganta sciuro. Ĉirkaj bestoj.

La 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj.

Recenzo: Dulingva libreto por infanoj.

Ekkonu mian landon: Nov-Zelando.

Rakonto: Se estus mi anstataŭ tiu.

Laste: Juvelo en la suda pacifiko.

PROGRESIGA REVUO
POR LEGANTOJ
INTER 10- KAJ
100-JARAĜAJ



Enhavo



Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Ahmad Reza Mamduhi, IR) 4

Konversaciaj temoj: Scienc-fikcio! (Judit Felszeghy, HU) 5



Ekologio: EKO-Espero (Małgosia Komarnicka, PL) 9

Naturo: Ni savu la abelojn (Małgosia Komarnicka, PL) 11

Kantu kun Juna Amiko: Avino (Małgosia Komarnicka, PL; José de Jesús Campos Pacheco, CU) 12

Rakonto: Se estus mi anstataŭ tiu (Luiza Carol, IL) 14



LUME: El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) 16

LUDE, la unika dua etaĝo: Gasto sen avizo estas agrabla surprizo (Mónika Molnár, CH) 17



Naturo: Fluganta sciuro (Saliko, FI) 19

Cirkaj bestoj (José de Jesús Campos Pacheco, CU) 20



Legu librojn – premioj – konkursoj: Laŭtleĝu al mi panjo, paĉjo... (Małgosia Komarnicka, PL) 22

Klubo de bona libro: Reĝo Maĉjo la Unua (Irena Solarek, PL) 22



Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo:

Nov-Zelando (Stefan MacGill, NZ/HU) 24

Tra la mondo: Unuiĝintoj por paco (Stano Marček, SK) 28

Recenzo: Dulingva libreto por infanoj (Alessandra Madella, IT) 35

La 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj (Małgosia Komarnicka, PL) 29

Interkultura Mondo: Kie troviĝas paradizo... (Elena Nadikova, RU) 31

Ideo: Kiom stultan ideon mi havis... (Mireille Grosjean, CH) 33

Ekologio: Bluĝinzoj (Renée Triolle, FR) 35

Krucenigmo: Arko-krucenigmo (Stano Marček, SK) 37

LASTE: Juvelo en la suda Pacifiko² – ni ne hastas (Stefan MacGill, NZ/HU) 38

Eldonanto de Juna amiko: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). **Jura sidejo:** Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejoj:** Ĉefaj informoj pri Juna Amiko: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 154 (1972 ĝis 2018) publike legeblas ĉe: www.eventoj.hu/juna-amiko/. Vidu ankaŭ lenu.net kaj edukado.net. **Redaktoro:** Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), stano.marcek@gmail.com aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio) kaj Utho Maier (Germanio). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto:** Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto:** Sebastian Cyprych, ilei.oficejo@gmail.com. **Landaj Perantoj** sur la p. 39. La sekva numero aperos en februaro 2022. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** € 18 en t.n. A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€15 kaj €12 por mendo de 3 aŭ pli da ekz. al la sama adreso). Reta varianto: A-lande €11, B-lande €7.

ISSN 0230 1318

Karaj amikoj!

Unue mi bonvenigas sur la paĝoj de nia revuo la novan prezidanton de ILEI, s-ron Ahmad Reza Mamduhi (legu sube) – kaj deziras al li bonan kaj fruktodonan amikecon kun *Juna Amiko*!

Nia situacio pro la koron-virusa pandemio denove iom malboniĝas – kaj ni esperu (ni kredu!), ke ĝi baldaŭ ebligos al ni ne nur virtualajn ekskursojn kaj renkontiĝojn.

En ĉi-numero vi legos kial ni plantu arbojn (la bildstrio Kaĉjo) kaj kiel vivi kaj vestiĝi pli *ekologie* kaj pli *nature*. Vi povos denove kanti kaj danci, viziti “surterajn paradizojn” kaj konatiĝi kun bestoj en cirkoj kaj en zoologiaj ĝardenoj, kaj eĉ observi eksterteranojn en nia rubriko *Konversaciaj Temoj*. Ne mankos fabeloj kaj legendoj, kaj ankaŭ recenzo pri vere

bela dulingva libreto por infanoj, pri 10-jara reĝa filo Maĉjo. Vi povos viziti ankaŭ ekologian farmbienon Bona Espero en Brazilo, kolorigi bildojn kaj serĉi diferencojn inter ili (la rubriko *LUME*), kanti kuban kanton pri Avino, trovi kunikleton en subtegmenteja skatolo (la rubriko *LUDE*). *Juna Amiko* ebligos al vi ankaŭ konatiĝi kun flugantaj sciuroj kaj utilaj abeloj, solvi rondan arko-krucenigmon, lerni vivi kaj vestiĝi pli ekologie...

Luiza Carol rakontos al vi travivaĵojn el sia infanaĝo, kiuj ŝanĝis ŝian vivon. Ĉu vi travivis ion similan? – Kaj ĉu vi konas la insulan kaj montaran landon, la juvelon en Suda Pacifiko Nov-Zelandon kaj ĝiajn legendojn? Via redaktoro rakontos al vi pri internacia pacforumo en Slovakio, kiu subtenas Esperanton kiel internacian lingvon de paco. Kaj li deziras al vi agrablan legadon kaj bonan sanon. **Stano Marček**

Karaj legantoj!

Salutante ĉiujn vin kiel la nova prezidanto de ILEI, mi deziras tute bonan novjaron 2022, kiu vidu foraperon de la pandemio mondscale.

Mi estas Ahmad Reza Mamduhi, 61-jara arkitekto kaj urbafasonisto el Irano. Pasis pli ol 40 jaroj ekde kiam mi komencis instrui Esperanton en plej diversaj lokoj, i.a. element-lerneje kaj universitate. En la 1980aj jaroj mi fariĝis la unua ĉefdelegito de UEA en Irano, ankaŭ nun mi havas tiun honorindan postenon.

En la nova ILEI-Estraro min akompanas vere sindediĉaj kaj diligentaj kolegoj. Mi esperas, ke ĉiuj ni, kune kun subtenoj kaj instigoj, kiujn ni ricevos de vi kaj ĉiuj ILEI-membroj, povos almenaŭ iom sproni parton de nia Movado.




Ahmad Reza Mamduhi

En la Estraro ni tre ŝatas i.a., ke ILEI aliru internaciajn NeRegistarajn Organizaĵojn (NROjn), proponante al ili kion nia lingvo kaj Movado povas prezenti al ili. Prioritate ni kontaktu internaciajn por-Terajn kaj por-pacajn NROjn, dirante al ili, ke ni bone konscias pri iliaj lingvaj problemoj. Kompreneble ili, havante membrojn kaj/aŭ subtenantojn en tre multaj landoj de la mondo parolantaj ege diversajn lingvojn, povas utiligi Esperanton kiel unu el siaj laborlingvoj kaj por plibonigi sian internan komunikadon kaj por varbi novajn homojn al siaj sanktaj celoj.

Kompreneble la kurantaj aferoj de ILEI ne lasas multan tempon kaj energion por ni plenumi tion tutpotence kaj rapide, tamen ni esperas, ke ni sukcesos almenaŭ komenci ankaŭ tian direkton.

Kore,

Ahmad Reza Mamduhi



Sciencfikcio!

Help-materialo por progresemluloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy

I. Ĉu vizitas nin eksterteranoj?

Maria, la patrino (M) kaj Johano, la patro (J) babilas kun sia filo, Petro (P). Ili babilas hejme, vespere, antaŭ la televidilo:

M – Petro, fileto! Estas jam tempo por dormi! Matene vi estas ĉiam dormema, kiam vi devas iri al la lernejo.

P – Panjo, mi petas! Mi ege deziras spekti tiun ĉi sciencfikcian filmon.

M – Poste, dumnokte vi havos timigajn sonĝojn! Rememoru, ankaŭ lastfoje, vi venis en nian liton dormi, ĉar vi sonĝis, ke eksterteruloj atakas nian domon!

P – Tiam en la televido estis teruraj eksterteranoj, kiuj volis mortigi la homojn. En tiu ĉi filmo ili aspektas tute sendanĝeraj, eĉ amikemaj. Paĉjo,

kiel ili aspektas, ĉu tiel, aŭ tiel, kiel en la alia filmo?

J – Verŝajne nek tiel, nek tiel ĉi. Eble ili tute ne similas al ni, homoj.

P – La patro de mia samklasano, Andreo, jam renkontis unu! Tiu alvenis al ilia hejmo! Andreo rakontis, ke tiu iomete similis al ni, sed tiu havis pli grandajn kapon kaj okulojn. Kaj ties korpo estis verdec... Andreo eĉ diris, ke tiu alvenis per speciala spacŝipo, subtasforma...

M – Via amiko Andreo eble fantaziis. Por kiu celo eksterteranoj vizitu lian hejmon?

P – Sed Panjo, ja ankaŭ ni, homoj, jam povas veturi en la spacon. Tiel ankaŭ la estaĵoj povas alveni al ni, ĉu ne?

J – La sciencistoj trovis ĝis nun neniun veturilon aŭ estaĵon, kiu povis deveni el alia planedo.

P – Ĉu vi kredas, aŭ ne, Andreo montris al mi ankaŭ ĵurnalon, kie estis bildoj pri eksterteraj astronautoj kaj spacŝipoj. Kelkaj eksterteranoj povas aspekti ĝuste tiel, kiel ni, homoj. Kaj en homa formo ili vivas inter ni... Ĉu vi vidas, ankaŭ en tiu ĉi filmo, la fremduloj eligas el si verdecan lumon...

M – Fileto mia, tiu ĉi estas filmo, fantazio. Iu pripensis tion por amuziĝi.

P – Rigardu, tiu nun volas ataki la homojn! Kiel rapide li povas kuri!

J – Ne timu, li ne atakos... Vi mem diris, ke tiu ĉi eksterterano estas amikeca...

P – Ho! La filmo finiĝis! Ĝuste nun!

M – Postmorgaŭ estos la dua parto! Sed nun kuru dormi, ĉar estas jam malfrue!



II. La mistera vizito

Petro (P) babilas kun sia amiko Andreo (A) la sekvan tagon, en la lernejo, dum interleciona paŭzo.

P – Andreo, saluton! Estas iu tre gravega kaj sekreta afero!

A – Kio okazis?

P – Nun tio estas grava sekreto, sed baldaŭ tio estos grandega sensacio!

A – Sed diru jam, pri kio temas!

P – Unue vi ĵuru, ke vi rakontos tion al neni!

A – Bone, mi ĵuras.

P – (*Flustre*) Mi renkontis eksterteranojn!

A – Ne diru! Ĉu vere?

P – Jes ja! Almenaŭ unu!

A – Sed kie? Kiam?

P – Hieraŭ, nokte! Vi povos mem veni kaj kontroli. Ĉi-nokte, mi pensas, ke tiu denove venos... Ĉu vi havas poŝtelefonon kun fotilo? Aŭ fotoaparaton? Plej taŭga estus kamerao...

A – Por filmi? Hm... Mi ankoraŭ ne havas tiaĵon. Sed mi povos kunporti la telefonon de mia fratino. Mi demandas ŝin, kiel oni fotas kaj filmas per ĝi... se ŝi pruntedonos ĝin al mi. Sed diru, kio okazis!

P – Do... – post la televida programo mi estis en mia ĉambro hieraŭ vespere. Panjo kaj Paĉjo jam enlitiĝis. Mi estis pensanta pri eksterteranoj, kaj mi sentis ion. Mia fenestro rigardas al la flanko, kie estas la ĝardenoj, kaj la fenestro estis malfermita. Kaj tiam mi ekvidis ĝin. Aŭ lin...

A – Kion?

P – La eksterteranon.

A – Kia ĝi estis? Kion ĝi faris?

P – Estis malhele, sed eble ĝuste tiam ĝi surteriĝis. En la direkto de la najbara tereno. Mi vidis malfortan verdecan lumon! Poste ankaŭ iun ombron. Mi pensas, ke ĝi estis mezgranda... Mi tiam ŝtele eliris el la domo, kaj alproksimiĝis, por pli bone vidi. Tiam la lumo tute malaperis, estis tute malhele. Mi pensis, eble la eksterterano malkovris min, kaj foriris... Mi iris plu!

A – Vi estas tre kuraĝa, Peĉjo! Ĉu vi tute ne timis?

P – Tute ne! Sed mi tamen kunprenis mian akvopistolon, tiu ŝprucas akvon sufiĉe malproksimen. Poste denove ekis la verdea lumo! Mi denove vidis ĝin! Verŝajne ĝi ŝvebis en la aero! Krome aŭdeblis tre malforta sono... Mi haltis, kaj tiam la eksterterano abrupte ekmoviĝis. Iomete suben – supren, ien – tien, kaj poste tre rapide al mia direkto! Mi pafis per mia pistolo kontraŭ ĝi!

A – Eble ĝi volis ataki vin! Ĉi-nokte ni devas akiri pli seriozajn armilojn!

P – Jes! Ĝi eble eĉ tiel ektimis min, ĉar plu kuris al la direkto de la najbara domo! Kiam mi reiris en mian ĉambron, mi

vidis jam nenion tra la fenestro. Mi pensas, eble ĝi revenos hodiaŭ nokte! Ĉu vi venos?

A – Jes, mi volas, sed kion mi diru al miaj gepatroj, kien mi iros malfrue vespere?

P – Diru al ili, ke ni kune lernos, kaj poste vi dormos ĉe ni! Ankaŭ mi petos miajn gepatrojn.

III. La mistero kaj la realo

Samtage, posttagmeze, Petro (P) decidas peti sian patrinon, Marian (M) pri permeso, por ke Andreo povu viziti lin kaj tranokti ĉe ili. La patrino (M) estas ĵus babilanta kun Najbaro Jozefo (N), kaj Petro, ĉu intence, ĉu hazarde, subaŭskultas ilin, malantaŭ la pordo.

N – Mi vidis en mia telefono, ke vi plurfoje vokis min telefone.

M – Jes, ĝuste! Najbaro Jozefo, mi volis aĉeti de vi kelkajn freŝajn ovojn, se vi havas.

N – Bedaŭrinde jam nur du – tri. Mi devas nun ŝargi mian telefonon, tial mi pensis, ke mi vizitu vin, sinjorino Maria. Hieraŭ mi perdis mian telefonon, tial mi ne povis respondi.

M – Bonŝance, ke vi poste retrovis ĝin!

N – Danke al al mia lerta hundo! Mi nur vespere rimarkis, ke mi ne trovas mian porteblan telefonon. Kiam nia filino hejmenvenis vespere, ŝi proponis voki mian numeron, kaj laŭ la sonorado ni povas trovi la aparaton.

M – Kaj vi tiel retrovis ĝin, ĉu?

N – Ho, ne! Mi tute forgesis, kie mi lasis ĝin. Mi laboris en la ĝardeno, kaj verŝajne mi metis la telefonon ie tie. Supozeble mi bone kaŝis ĝin, ege fore, kaj mi ne povis aŭdi la sonoradon. Antaŭ ol mi enlitiĝis, mi ellasis la hundon. Mi lasis la pordon malfermita, kaj jen kion mi vidis: al-kuras nia hundo, kaj enbuŝe ĝi portas la telefonon sonorantan!


M – Kiel lertan hundon vi havas!

N – Ho, tio estas la merito de mia filino! Ŝi instruas al la hundo diversajn ludojn, ankaŭ tion ŝi vidis en la televido, en iu krimo-serio. Do, sinjorino Maria, mi portas al vi la ovojn, kaj se vi ankoraŭ bezonas pliajn, voku min trankvile, mi jam ne perdos mian telefonon!

P – (*En si mem*.) Ho! La telefono de Najbaro Jozefo! Kiu sonoris! Kiu havis verdan lumeton dum la sonorado! Neniu eksterterano! Neniu kosmo-ŝipo! La hundo kuris kun la telefono, la hundo movis ĝin ien-tien, kiam ĝi kaptis la telefonon! La hundon mi ŝprucis per mia pistolo! Ho-ho! La realo estas ne tiel interesa, kiel la sciencfikciaj filmoj. Kion mi diros nun al Andreo? Pri fotado, filmado kaj pri armiloj kontraŭ la eksterteranoj! Kion diros nun Andreo? Li ja baldaŭ alvenos! Mi devas paroli kun Panjo!

P – (*Laŭte, reen en la domon*.) Panjo, Panjo!

M – Mi estas ĉi tie, Peĉjo, diru, kion vi deziras!





P – Ĉu Andreo povos tranokti ĉe ni ĉi-nokte? Ni kune spektos la duan parton de la sciencfikcia filmo vespere.

M – Certe, fileto, post la lernado!

TASKOJ

I. Post atenta legado kaj kompreno

a) respondu la demandojn:

- Kian filmon spektis la familio en la televido? – Pri kio temis la filmo?
- Kio estis videbla en la filmo, laŭ vi?
- Kiel plaĉis la filmo al la familianoj? – Kiun opinion havis Patro, Patrino kaj Petro pri la filmo? – Kion rakontis Petro al sia amiko la sekvan tagon? – Pri kio interkonsentis la du amikoj? – Kion vidis Petro nokte?
- Kial li iris en la ĝardenon? – Kion li faris tie? – Kial Petro reiris al sia ĉambro? – Kies interparolon aŭdis Petro posttagmeze?
- Kion rakontis la najbaro? – Kion pensis Petro, aŭdinte la interparolon? – Laŭ vi, kion faros Petro kaj lia amiko en la sekva vespero?

b) rakontu, kio okazas en la 1-a, 2-a kaj la 3-a dialogoj!

II. a) Imagu, ke vi renkontas eksterteranon, kaj vi uzas Esperanton, kiel komunan lingvon! Kion vi demandus de ĝi? Klopodu diveni kiel eble plej multajn demandojn!

b) Ĉu vi, aŭ via amiko, konatulo, jam havis similan aventuron kiel Petro? Rakontu ĝin en 4 – 8 frazoj!

c) Ĉu vi jam spektis filmon, aŭ legis libron pri sciencfikcio? Rakontu la enhavon en 5 – 10 frazoj!

III. a) Diskutu kun via(j) samgrupano(j), kion vi opinias pri ekstertera

vivo, ebloj pri vojaĝo al aliaj planedoj kaj pri vivo ekstertera. Kion vi opinias pri vizito de eksterteranoj: kio povus esti ilia celo rilate nian planedon?

b) Preparu skriban raporton en 17-22 linioj pri imagita ekveturo de grupeto da homoj al alia planedo, kiel ili estas vestitaj, kion ili kunhavas, kial ili entreprenas tian vojaĝon!

Vortklarigoj

Kamerao: aparato taŭga por registri filmojn.

Spaco: (speciala signifo) la vastega spaco ekster nia Tero.

Akvo-pistolo, akvo-pafilo: ludilo, per kiu oni povas malproksimen ŝpruci akvon.

Eksterterano, eksterterulo: laŭ la supozoj vivanta, foje hom-simila estaĵo, kiu vivas ekster nia Tero.

Planedo: ĉiela korpo, kiu mem ne lumas, ankaŭ nia Tero estas planedo.

Spac-ŝipo, kosmo-ŝipo: veturilo, kiu veturas en la spaco.

Mistero: neklariĝebla kaj kaŝita fakto.

Ŝargi: meti elektron en aparaton, ekzemple en telefonon.

Kosmo: la universo.

EKO-Espero

Kiam mi komencis skribi la artikolojn pri ekologio, mi ankaŭ komencis serĉi eblecon prepari temarsimile programojn por pli vasta publiko.

Tial kiam mi rimarkis, ke Oficejo de Marŝalo de Malsupra Silezio (en Pollando) organizas konkurson por tiuj, kiuj promocias ekologiajn agojn, mi tuj preparis projekton kaj sukcese partoprenis en la konkurso. Mi kreis EKO-Grupon, kies gvidantino fariĝis mia amikino Joasia Kwiatkowska. Mi nomis la projekton EKO-Espero. Mi multfoje uzas Esperantajn nomojn por miaj programoj, ĉar tiam mi havas eblecon informi neesperantistan publikon ankaŭ pri Esperanto. Tio bonege veriĝas. La programo EKO-Espero daŭris dum du monatoj, julie kaj aŭguste, kaj okazadis en la sidejo de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado.

La ĉefa celo de la programo EKO-Espero estis vekti ekologian konscion de la partoprenantoj, ellerni mallarĝigi ligilojn kun la naturo kaj krei respondecan sintenon por la nuna kaj la estonta mondo. La renkontiĝoj estis okazo ne nur por agrable pasigi la tempon, sed antaŭ ĉio dividiĝi kun siaj spertoj kaj proponoj, esplori gravajn temojn kaj vikle diskuti.

La programo konsistis el kelkaj partoj, sed ĝia ĉefa kerno estis prelegoj kaj diskutoj pri ekologio kaj aldone estis ankaŭ kulinaraj laborsesioj, gimnastiko kaj recikligo.

La prelegoj pri ekologio, kiujn mi gvidis, konsciigis al partoprenantoj, kiel ili devas



enkonduki ekologiajn ŝanĝojn en siajn vivojn. Kiel prudente fari aĉetojn (kun listo, por ne aĉeti pli, ol ni bezonas), ŝpari akvon kaj energion, ne malŝpari nutraĵojn (uzadi ĉiujn manĝestaĵojn de legomoj), grupigi rubaĵojn, zorgi pri abeloj aŭ ellerni vivi laŭ la principo “senbrueco”.

Dum la programo mi prezentis ankaŭ veran memsufiĉan ekologian centron en Brazilo **Bona Espero** (la supra bildo), por konvinki la publikon, ke oni povas feliĉe vivi, estimante la naturon. Mi povis pliriĉigi mian rakonton laŭ propraj impresoj dum la restado en Bona Espero kaj ankaŭ laŭ la filmo, kiun por la bezono de nia programo preparis Julio Calegari, la prezidanto de Rotary Esperanto-Klubo. Mi do substrekis, ke Bona Espero estas grava loko – farmbieno – kie oni produktas necesajn legomojn, kiuj garantias memsufiĉon al la loĝantoj kaj alvenantaj gastoj. Dum kultivado de legomoj kaj arbofruktoj tie oni ne uzas kemiaĵojn. Ĉiuj nutraĵoj estas preparitaj el freŝaj produktoj. Tie oni vivas kun estimo por la naturo.

La kulinarajn laborsesiojn gvidis Irenka Solarek, kiu pruvis, ke ni povas prepari bongustajn manĝaĵojn, eluzante ĉiujn manĝeblajn partojn de la legomoj kaj dank’ al tio ni ne malŝparas nutraĵojn. Tiuj kulinaraj laborsesioj helpis ellerni prudente plani preparadon de manĝaĵoj laŭ la principo “la senrubeco”. La prepar-



Dolnośląskie
Małe Granty


DOLNY
ŚLĄSK



Projekt realizowany w Programie
Dolnośląskie Małe Granty
ze środków budżetu Zarządu
Województwa Dolnośląskiego

Działamy
ekologicznie!





itajn sanigajn manĝaĵojn kaj konvinkiĝi, ke manĝaĵo el partoj de forĵetitaj legomoj estas ankaŭ tre bongusta.

Dum nia programo ni proponis ankaŭ korpekzercojn, kiuj influis pozitive la korpojn kaj animojn de la partoprenantoj. Moviĝo estas al ni tre bezonata, precipe nun, dum la pandemio. La serion de simplaj korpekzercoj speciale por la bezonoj de nia programo preparis kaj gvidis Teresa Tadeuszyk.

Realigante la projekton ni klopodis konsciigi, kiel grava estas la recikligo. Ni montris, kiel facile estas doni duan vivon ekzemple al vitraj pokaletoj → de jogurto, kiujn ni uzis dum kulinarij laborsesioj. El tiuj pokaletoj sub la gvido de Renata Gładysiewicz estis faritaj belaj kandelinoj aŭ florpotetoj. La recikligo estas ankaŭ bona man-terapio. Fine de la programo estis preparita kaj eldonita dulingva broŝuro, pole kaj Esperante,



por substreki la rolon de la universala lingvo Esperanto en la internacia interkomunikado. En la broŝuro troviĝas parto de la prezentita ekologia programo, por helpi al la partoprenantoj firmigi akiritajn informojn. En ĝi troviĝas ankaŭ elektitaj receptoj kaj korpekzercoj, kaj priskribo, kiamaniere fari “recikligan” kandelington.

La gvidantinoj de la projekto EKO-Espero sukcesis konsciigi homojn, ke oni devas kiel eble plej rapide enkonduki ekologiajn ŝanĝojn en nian vivon, ke la homo kreas kun la naturo kompleksojn kaj ke li ne povas troe eluzi ĝiajn provizojn. En tempoj, kiam nia planedo tiel minacate estas detruata, **ekologio estas** ne nur modo, tio estas jam **nia devo**. Vivante kongrue kun la ekologiaj principoj ni zorgas pri feliĉa vivo de nia kaj de la estontaj generacioj. Tio ne postulas rezignojn kaj kiel ekzemplo de sukcesa vivo kun la naturo estis prezentita la Esperanta centro en Brazilo Bona Espero.



Mi aldonos, ke en nia programo partoprenis pli da personoj ol ni planis. Tio signifas, ke programoj pri ekologio estas bezonataj. Akompanis nin vigla diskuto kaj escepta etoso. Sub ĝia influo Joasia Kwiatkowska pentris belegan aĵ-bildon (la supra bildo, dorso de la broŝuro). Dum la programo ni ĉiuj multe ellernis unu de alia, ni dividigis kun niaj spertoj kaj volonte subtenis nin.

Małgosia Komarnicka



Ni savu la abelojn

Antaŭ pli ol 10 jaroj mi partoprenis en la seminario, kies temo estis “Ni savu la abelojn”.



Bedaŭrinde, tiam ne ĝis la fino mi konsentis pri la ĉefa ideo de la seminario, ke sen abeloj la mondo ne ekzistas, ke ili estas la plej gravaj insektoj sur nia planedo, ke kiam malaperos la lasta abelo, la vivo sur la tero ne daŭros eĉ 10 jarojn... Hodiaŭ mi konsentas pri konstato, kiu estas atribuita al Albert Einstein, ke “se malaperos lasta abelo sur la terglobo, al homaro restos nur 4 jaroj por vivi”. Kial? Ĉar en tiu tempo estos por ni provizo da nutraĵo. Jan, nia konata abelisto, de kiu de longa tempo mia familio aĉetas mielon, substrekas, ke sen abeloj ne estas rikoltaĵo, kaj ke oni devas savi tiujn neordinare utilajn insektojn. De li mi eksciis, ke por produkti duonlitron da mielo abeloj devas viziti ĉirkaŭ 2 500 000 florojn! Unu abelo dum tuta sia vivo produktas unu kuleron da mielo! Tio estas murda fortostreĉo, ĉu ne? Ĉu ni tion aprezas?

La abeloj estas do tre grava ligilo en la naturo, ili estas al ni tre bezonataj. Ne temas nur pri mielo, ĉar sen ĝi ni travivos. Al la abeloj, la solaj el la plej laboremaj insektoj, ni ŝuldas dankon pro 75 % monda produkto de nutraĵoj. La abeloj estas respondecaj pri poleno de ni manĝeblaj plantoj. Manĝante legomojn, fruktojn, akvumante florojn aŭ preparante paŝtaĵojn por bestoj ni pensu pri abeloj. Sen ili multaj fundamentaj produktoj ne troviĝus sur niaj teleroj.

Ekstermo de la abeloj estus por la mondo ege ekologia kataklismo!, estus malsato! La abel-kolektivoj draste malgrandiĝas. Kio estas kaŭzo, ke la abelaj familioj amase forpereas? Kaŭzoj estas multaj. Unu el ili estas naturaj malsanoj, kiuj aperas en la naturo, sed signife pli danĝera estas

nerespondeca procedo de homoj. Klimatŝanĝoj, kiujn elvokas nia agado, malplifortigas organismon de abeloj, paralizas ilian naturan ciklon. La vintroj estas pli varmaj kaj la someroj pli malvarmaj. Estas

do malpli da floroj kaj ilia nektaro estas la sola fonto de nutraĵo de abeloj. Uzado de toksaj sterkoj, kiuj estas danĝeraj por abeloj, sed ne por herbaĉoj. En la mondo estas teritorioj sen abeloj, kie homoj devas mem poleni florojn per penikoj. Ĉu ili povas fari tion same, kiel abeloj? Kompreneble, ke ne.

La abeloj forpereas precipe en tiuj lokoj, kie estas kultivata amasa terkulturado, do homogenaj specoj. Tiam la abeloj kolektas nektaron nur el unu planto kaj por la abeloj tio estas nenatura stato. Ili devas poleni diversajn florojn kaj kolekti nektaron el diversaj plantoj.

Teknologio en ĉiutaga vivo devas helpi kaj ne malutili. Bedaŭrinde ni ofte elvokas tiel nomatan naturpoluadon per elektroradiado, kiu negative influas al la abeloj. Tio malfaciligas al ili trovadon de floroj kaj revenon al la abelujo. Ekzistas multaj rimedoj por savi abelojn, tiujn la plej laboremajn kaj la plej bezonatajn insektojn de la mondo. Antaŭ ĉio oni devas kompreni, ke tiuj neordinaraj insektoj estas viktimoj de la hom-agado malgraŭ tio, ke ili faras por ni tiom da bono. Ĉiu el ni do povas enmeti kontribuojn por savi abelfamilion. Sufiĉas en la ĝardeno, aŭ en kesteto sur fenestrobreto, planti naturajn, nemoĝifatajn florojn aŭ kurac-herbojn. Inter ilin valoras enmeti bovleton kun akvo, ĉar la abeloj bezonas akvon.

Dank’ al iniciato de Slovenio, Unuigintaj Nacioj rezoluciis Mondan Tagon de Abeloj, kiun ni festas la 20-an de majo. Tiu tago estas la naskiĝtago de Anton Janša (20.05.1734 – 13.09.1773), slovena abelisto kaj pentristo, pioniro de moderna abelkulturado.

Małgosia Komarnicka

La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,
ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, malgosia.junaamiko@gmail.com



Kanto akompanas nin ĉie... Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, ebligas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.

Ĝi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, kantante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝigon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti – kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugeste alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas fremdan lingvon. La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj. Mi prezentas la kanton *Avino*, kiun sendis longdaŭra kunlaboranto de *Juna Amiko* José de Jesús Campos Pacheco el Kubo. Ĝin verkis Maria Alvarez Ríos. La kanto estis kantata de infanoj dum la 75-a Universala Kongreso de Esperanto en Kubo en la jaro 1990.

Avino

Avino, diru kio okazos
se stelo sur mian kapon falas?
Ne timu, ne timu kara mia,
la stelo ne faras tian aferon,
Ĝi nur volas ornamii la ĉielon,
ĝi nur volas ornamii la ĉielon.

Avino
Aŭtorino: Mariá Álvares Ríos (1919-2020)

A - vi - no , diru, kio - ka - zos , se ste - lo sur mi an ka - pon fa - las. Ne
ti - mu, ne ti - mu ka - ra mia, la ste - lo ne fa - ras tian a - fe - ron. Ĝi nur vo - las or -
na - mi la ĉie - lon, ĝi nur vo - las or - na - mi la ĉie - lon.

Avino, diru kio okazos
se mi trovas la lupon tra la arbaro?
Ne timu, ne timu kara mia,
ĝi estos venkita de infanoj,
kaj ĝi eĉ ne ekmovos la piedon,
kaj ĝi eĉ ne ekmovos la piedon.

Avino, diru kio okazos
se abrupte mi trovas trezoregon?
Tre bone, tre bone kara mia,
ĝin vi disdonos egale inter la homoj,
kaj certe pro vi ili restos kontentaj,
kaj certe pro vi ili restos kontentaj.

Avino, diru kio okazos
se la homoj ne iras al milito?
Tre bone, tre bone kara mia,
ĝi estos la tago plej bela sur la tero,
la ĉielo vere brilos serene,
la ĉielo vere brilos serene.

La konkursaj taskoj:

Sube estas desegnaĵoj, kiujn preparis la desegnistoj Danny Daniel kaj Roger Mir. La supraj desegnaĵoj – bonvolu enmeti en la vezikojn ĝustajn tekstojn el la kanto! La subaj desegnaĵoj – bonvolu en la vezikojn enmeti propran, elpensitan tekston.


Bonvolu ankaŭ kolorigi la bildojn. Alia konkursa tasko estas prepari respondon de la avino je la demando:

“Avino, diru, kio okazos, se en la mondo jam ne estos la pandemio?”

Viajn respondojn sendu ĝis la 30-a de januaro 2022 rete al mia retadreso. Ilin premios *Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej* (Eŭropa Centro de Interkultura Edukado www.ecem.com.pl).

Kantu, kolorigu kaj solvu!

Bonvolu sendi al mi viajn proponojn, ke ni ekkonu belajn kantojn el la tuta mondo.



“Se estus mi anstataŭ tiu”

Rakonto de Luiza Carol

Estis malvarmega ventega vintro en Bukaresto en 1954, kiam mi vizitadis la unuan klason de bazlernejo.

Komence de tiu vintro, ni ekkhavis novan koleginon, kiu ĵus transloĝiĝis en nian kvartalon. Kelkajn tagojn post sia alveno, tiu knabino ŝtelis la lanan ĉapon de alia knabino. Ŝi mallerte kaŝis ĝin, tiel ke oni tuj malkovris la ŝtelon kaj ŝi estis devigata redoni la ĉapon plorante. Sed neniu el ni plu volis proksimiĝi al la eta ŝtelistino. Subite ni ne plu parolis kun ŝi, ne plu ludis kun ŝi kaj ne plu sidiĝis apud ŝi. Ĉio ĉi okazis dum la lasta paŭzo de tiu tago. Kelkaj knabinoj kriis aĉajn insultojn al la ŝtelistino kaj minacis bati ŝin, sed ili ne havis tempon plenumi sian intencon, ĉar la paŭzo finiĝis. Ili furioze kaj brue anoncis nian instruiston pri la okazaĵo.

Tiu ĉi unue silentigis ĉiujn. Ŝi rigardis per kortuŝita mieno la etan ŝtelistinon, kvazaŭ ŝi estus rigardanta tremantan timigitan leporidon. Nur tiam mi rimarkis, ke tiu knabino estis pli malalta kaj maldika ol aliaj infanoj siaĝaj. Ŝia uniforma robo estis tro longa kaj rompita ĉe la manikoj. Ŝiaj malsekaj ŝuoj estis truitaj, kaj ŝi ne havis ŝtrumpojn.

La instruistino diris per milda voĉo:

– Karulino mia... Kial vi ne diris al mi, ke vi bezonas ĉapon? Se mi sciintus, mi pensus pri iu rimedo... Ankaŭ viaj koleginoj povintus pensi pri iu maniero helpi vin, ĉu ne? Certe iu knabino, kiu havas palton kun kapuĉo, povintus pruntedoni al vi sian ĉapon, sen tro suferi mem pri malvarmo... Bonvolu promesi solene, ke vi neniam, neniam faros tion denove! Neniam...

La knabineto faris promeson ploreigante en la brakoj de la instruistino, kiu montris

al ŝi sian lanan koltukon, sufiĉe larĝa por bone kovri la kapon kaj la kolon de la infano. Ŝi diris:

– Mi ne nepre bezonas mian koltukon, ĉar mia palto havas altan kolumon kovrantan mian kolon. Ĉu vi volas ricevi mian koltukon? Se jes, mi postulas ke vi faru iun laboron, por meriti ĝin.

Kaj jen tio kion ŝi postulis. Ŝi donis al la infano tabelon kun ĉiuj literoj de la rumana alfabeto ordigitaj laŭvice, kaj iris kun ŝi apude, al la lerneja biblioteko. Tie ŝi petis la afablan bibliotekiston akcepti la helpon de la knabino por ordigi la librojn laŭalfabete. Tiu ĉi ekzerco helpis la etan lernantinon memori la vicon de la literoj kaj samtempe donis al ŝi la senton ke ŝi ne “almozas”, sed gajnas la koltukon, ĉar ŝi faras gravan laboron por la biblioteko. La instruistino revenis tuj en la klason kaj parolis kun ni sen la ĉeesto de nia nova koleginino.

Tiam, per simplaj vortoj, ŝi instruis nin la ludon “se estus mi anstataŭ tiu”. Ŝi diris, ke kvankam neniu povas sperti la vivon de aliulo, tamen oni ja povas imagi dum kelkdeko da minutoj, ke ni anstataŭigas nian vivon per tiu de aliulo. Ĝuste tio konsistigas la ludon “se estus mi anstataŭ tiu”. Kaj ĉu ne estas tiu ludo tio, kion ĉiuj filmoj kaj ĉiuj beletraĵoj proponas al ni? Kaj ĉu ne estas tia sperto fascina ĝuste pro tio, ke ĝi ebligas nin pli-malpli kompreni la vidpunkton de alia persono? Kiel eblas estigi rilatojn de amikeco, sen provi tutkore kaj sincere kompreni la vidpunktojn de aliuloj? Kompreneble, oni neniam sukcesas ĝisfunde en tia ludo, sed tre indas almenaŭ strebi...

Por la komenco, la instruistino proponis al ni imagi ke ni havus la sorton de la eta knabino, kiu intertempe estis ordiganta librojn en la biblioteko.

Mi rememoras, ke mi aŭskultis la instruiston senspire... Dum ŝi parolis, mi sentis min kvazaŭ mi travivus paralelan vivon...

... En tiu vivo, mi neniam vidis mian patron, kaj mia patrino estis en alia urbo. Mi loĝis portempe ĉe mia onklino, en ŝia tre malnova dometo, kien ŝi kaj mi devis alporti malvarman akvon per siteloj el komuna krano. La onklino ne havis edzon. Ŝi perlaboris sian vivon ludante akordionon en iu drinkejo. Ŝi havis ankaŭ siajn proprajn infanojn, kaj ŝi apenaŭ kapablis nutri kaj ilin kaj min...

Nia instruistino havis belegan talenton de rakontisto. Ni eksciis, ke nia eta koleginino scipovis helpi pri la zorgado de siaj bebaj gekuzoj, lavi vestojn kaj purigi la dometon de sia onklino. Je tiu aĝo, estis preskaŭ neeble al mi imagi, ke mi kapablus iam ajn plenumi tiom da malfacilaj taskoj...

La instruistino igis nin imagi, ke ni devintus alveni al la lernejo tiumatene sen ĉapo kaj sen koltuko, kun nudaj piedoj en truitaj ŝuoj... Mi honte pensis, ke mi eble rezignus pri la lernejo dum la tuta vintro, se mankus al mi taŭgaj vestoj...

Ni krome eksciis, ke la knabino scipovis ludi akordionon. Ni decidis proponi al ŝi kontribui per muziko al nia baldaŭa Novjara Festo.

Mi ne rememoras ĉiujn detalojn pri tiu paralela vivo, kiun mi travivis dum ĉirkaŭ kvarona horo. Kiam mi revenis al mi mem, mi havis miksitajn reagojn, pri kiuj mi ne povis klare konscii je tiu aĝo. Unuflanke mi abomenis ŝteladon, ĉar oni edukis min tiel en la familio. Aliflanke mi sentis ke, se mi estus en ŝia situacio... min ege embarasus peti helpon de tute novaj koleginoj... Des malpli mi aŭdacus paroli pri tio kun apenaŭ konata nova instruistino... La knabino al kiu apartenis tiu ĉapo ne havis palton kun kapuĉo, sed ja havis larĝan koltukon, kiu povintus anstataŭi la ĉapon. Do ŝi ne tro

suferintus pro la manko de la ĉapo... Eble la nova koleginino eĉ ne aŭdis en sia familio, ke ŝtelado estas terure hontinda agado... Mi ja havis familion kiu bone okupiĝis pri mi. Mi havis vestojn sen klopodi meriti ilin, kaj eĉ ne estis sufiĉe danko pro tio.

Se estintus mi anstataŭ tiu knabino, ĉu mi povintus esti sufiĉe saĝa, por decidi ĝuste kiel mi devas konduti?... Ĉu?... Ĉu?...

Verŝajne miaj koleginoj sentis similan konfuzon en siaj koroj, sed ni silentis, ĉar ne kapablis esprimi niajn sentojn...

Dum la sekvaj tagoj, nia instruistino rakontis al ni fabelojn pri amikeco kaj helpemo, sed ankaŭ pri la sociaj malbonaĵoj kiujn ŝtelemo alportas. Ni ludis la ludon “se estus mi anstataŭ tiu” pri la protagonisto de tiuj fabeloj. Dum la vintraj ferioj, la nova knabino vizitis kelkajn el ni. Ŝi alportis la akordionon kaj regalis niajn familiojn per bela muziko. Nij patrinoj rekompensis ŝin per dolĉaĵoj kaj pakaĵoj kun vintraj vestoj ne tute novaj, sed puraj kaj nerompitaj. Post la ferioj, nia instruistino igis nin ludi la novan ludon pri diversaj fabeloj kaj eĉ elpensi niajn proprajn fabelojn. Ŝi ankaŭ komencis instrui al ni trikadon, por ke ni ekkapablu triki koltukojn. Per la helpo de la instruistino, la nova knabino eĉ sukcesis fari kapuĉon el faldita koltuko.

En la printempo, ŝi foriris el nia kvartalo kaj ĉesis viziti nian lernejon. Ĉu ŝia patrino prenis ŝin en alian urbon?

Mi ne plu rememoras ŝian nomon. Eĉ ŝian vizaĝon mi ne plu rememoras. Ŝi ne aperas sur la nigre-blanka foto pri la lasta tago de tiu lernoĵaro, la sola foto kiun mi

konservis pri tiu periodo. Kie ŝi vivas nun? Kiel ŝi vivas? Ĉu ŝi rememoras la tiaman solenan promeson? Ĉu ŝi rememoras la ludon? Ĉu ŝi spertiĝis pri trikado?

Mi neniam plu tuŝis trikilojn. Sed la ludo “Se estus mi anstataŭ tiu” fariĝis grava parto de mia pensmaniero dum la resto de mia vivo.




El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Nomu la objektojn, plantojn, bestojn, birdojn kaj homojn! Kie ili estas? Kion ili faras? Kiujn vestaĵojn portas la homoj? Kiujn kolorojn havas la objektoj, plantoj, arboj, ĉielo, domo, nuboj, fumo, bestoj kaj vestoj? Kio okazas sur la bildo? Kio plia videblas sur la bildo?

Gasto sen avizo estas agrabla surprizo



La rubrikon prizorgas: Mónica Molnár


La Ulidoj rekomencis la lernejon post la aŭtunaj feri-tagoj. Ili laboris bone kaj diligente en la lernejo kaj ludis, kuris gaje ekstere posttagmeze.

Ĉi-jare estis bela aŭtuno. Ĝuste tia, kian oni ne povas ne ŝati. La arboj vestiĝis je buntaj koloroj kaj la sunradioj or-kolore karesis ilin.

Por ludi ekstere oni bezonis jam pli varme vestiĝi, sed tio tute ne ĝenis la Ulidojn. Ludemulido ĉiam havis ideojn, Kuiremulido ĉiam havis manĝaĵetojn por ĉiuj kaj Gajulido sukcesis ĉiam ridetigi ĉiujn. Ili ĵus revenis el la posttagmeza ludado. La etaj nazoj, same kiel la etaj manoj estis tute ruĝaj pro la malaltiganta temperaturo. Ili estis ŝanĝantaj la ŝuojn je pantofloj, kiam iu nekutima bruo avertis ilin, ke ili ne estas solaj. Ekzakte! Enirante la salonon, ili ĝojkrie malkovris la bruanton:



– Onklo Vojaĝemulo! Kiom bonas vidi vin! Jam delonge ni ne vidis vin! – kriis Gajulido. – Kie vi estis? Kion vi faris? – Saluton, ĝejnuloj! – diris la onklo kaj gaje ĉirkaŭbrakumis la ekscititajn Ulidojn. – Jes, mi iom vojaĝis en la mondo kaj ĵus revenis por tuj vidi miajn preferatajn genevojn. Ĉu vi estis bonaj geknaboj dum mi estis for? Ĉu vi meritas donacetojn? – Ho, Onklo Vojaĝemulo! – kriis Kuiremulido – Ni ĉiam estas bonaj! Ĉu vi alportis al ni iun specialan manĝaĵeton? Eble iun ekzotan ĉokoladeton? – Hahaha! – ridis la onklo – certe mi alportis ion al vi ĉiuj, sed la dolĉaĵojn vi havos post la vespermanĝo. Tamen, estas kelkaj aliaj donacoj, kiujn vi povas malfermi jam nun. Ekzemple tiu ĉi pakajeto ŝajnas esti bela libreto. Ĉu ni legu ĝin kune?





Eloïse Marotte:
Stella



Jen la lernejo de Luna. La lecionoj komenciĝas je la 7a horo kaj finiĝas je la 16a horo. Poste ŝi iras hejmen.



Hejme ŝi ne vidas siajn gepatrojn. Do, ŝi estas sola por elekti manĝaĵetojn. Ŝi manĝas ĉokoladon kaj glaciaĵon...

		
Poste ŝi iras fari siajn hejmtaskojn. Morgaŭ ŝi havos kontrolon pri matematiko. Sed... „Kraak... kraak... krok... krik...” Ŝi aŭdas iom da bruoj.	Ŝi rimarkas, ke la bruoj venas el la subtegmentejo, do ŝi decidas iri tien, por vidi kio okazas. Ŝi supreniras la ŝtuparon kaj malfermas la pordon...	Kiam ŝi alvenas supren, ŝi vidas nenion eksterordinaran. Estas bretoj, skatoloj, araneoj kun araneaĵoj. Tamen ŝi certas, ke la bruoj venis de tie!
		– Kiom bela estas la rakonto de Eloïse [‘eloiz’]! Kaj ĉu vi vidis, Luna havas pli-malpli la saman horaron kiel ni! – diris Gajemulido. – Jes, sed ŝi ne havas la samajn posttagmezajn manĝaĵetojn, kiel ni! – diris Kuiremulido. – Mi volonte manĝus kiel ŝi! – Hmm... – diris la onklo – Ĉu vi ne pensas, ke ankaŭ Luna manĝas alimaniere kiam la gepatroj estas hejme? Mi pensas, ke tio estis nur escepto, kaj fakte mi esperas, ke estis tiel. Kiu el vi neniam eluzis la okazon por manĝi laŭplaĉe kiam la gepatroj estas for?
Sed nun estas silento... Kiam ŝi volas reiri por fini siajn hejmtaskojn, ŝi denove ekaŭdas la bruojn! „Krik-krik-krik...” La bruoj venas el granda, bruna skatolo. Ŝi prenas kaj malfermas ĝin...	Ŝi vidas kuniklon en la skatolo! Luna prenas kaj nomas ĝin Stella. Stella havas vunditan piedeton. Luna flegas ĝin, kaj post unu semajno, kiam Stella fartos bone, ŝi redonos al ĝi la liberecon.	

Iu-foje ne gravas. Ĉiu-foje ne bonas. Sed ĉu vi ŝatus malfermi ankaŭ la aliajn pakajetojn aŭ ĉu ni lasu ilin por morgaŭ? – Morgaŭ estas tro malproksime kaj ni havas tempon ĝis la vespermanĝo. – diris Ludemulido. – Ĉu ni povas malfermi la

donacetojn? Estas preskaŭ Kristnasko unu monaton pli frue! – Bone. Ek al la donacoj kaj diveni kie mi estis? – diris la onklo.



Fluganta sciuro, *Pteromys volans*

En la mondo troviĝas bestoj, kiujn vi ne jam konas, kaj troviĝas aliaj, konataj, sed eble sen nomo en via lingvo.

Unu tia estas lafluganta sciuro, kiun Esperante oni nomas flugsciuro aŭ sciuroptero. Ĝi vivas en Eŭropo kaj Azio ĝis Hokajdo, en arbaroj, kie kreskas multaj piceoj kaj kelkaj folioarboj. Ĝia hejmo estas la tajgo. Oni ne konas ĝin, ĉar ĝi rariĝis, ĝi moviĝas nur nokte kaj neniam bruas. En Finnlando ĝi estas protektata. Oni eĉ ne rajtas faligi la arbon, kie ĝi nestas. Gufoj, strigoj kaj musteloj provas kapti ĝin kaj nutri sin.

La hararo de la flugsciuro estas griza, silke mola. Antaŭ longe oni ĉasis ĝin pro la felo. Ĝi havas grandajn okulojn por bone vidi en la nokto. Ĝi pezas 100-200 gramojn, ĝiaj idoj nur 5 gramojn. Ĝi havas plurajn nestojn en truoj en arbotrunkoj. La neston, kie ĝi en marto naskas la idojn, ĝi moligas per musko kaj likeno. Post unu monato la idoj elnestiĝas.



Flugsciuroj manĝas burĝonojn, foliojn, fungojn, nuksojn kaj berojn. Inter si ili komunikas per ultrasonoj, kiujn homoj ne aŭdas. Ĉirkaŭ si ĉiu flugsciuro bezonas grandan propran teritorion, inoj 10 hektarojn, maskloj 50 hektarojn.

Flugsciuro povas flugi 80 metrojn de arbo al arbo. Inter siaj antaŭaj kaj malantaŭaj piedoj ĝi havas senharan haŭtmembranon, kiun ĝi uzas por teni sin en la aero.

Ĉar estas ege malfacile vidi la flugsciurojn, oni lernis serĉi iliajn fekajetojn sur neĝo sub la arboj. Tio estas kvazaŭ oranje flavaj grajnetoj. La koloro venas el la poleno en la amontoj (flavaj floroj), kiujn la sciuroj manĝas. Se finnoj planis konstrui vojon aŭ domon tiuloke, ili devas tuj ŝanĝi siajn planojn por ne ĝeni la flugsciurojn. Du finnaj urboj fieras pri tio, ke flugsciuroj daŭre vivas en la ĉir-kaŭa arbaro. Ili uzas la flugsciuron kiel insignon en sia turisma reklamado.

Saliko



Cirkaj bestoj

De longe la homo provis kunvivi kun sovaĝaj bestoj, alproksimiĝi al ili kaj fine kunlabori.

Bela ekzemplo estas ĉevalo, kiu libere are vivas, sed iom post iom iĝis kunlaboranto de homo por farmaj laboroj. Same kato, kiu ĉasas musojn, aŭ hundo, parenco de lupo, kiu defendas. Kiam eŭropanoj komencis koloniigi Afrikon kaj Azion, ili malkovris ankaŭ sovaĝajn nekonatajn bestojn, ekz. leonon, tigron aŭ urson. Dum jardekoj cirko estis loko, kie, apud bestĝardeno, eblas vidi tiujn ekzotikajn bestojn, travivi emociojn, kiam homo frontas grandan sovaĝan beston.

Multaj bestoj rolas kun dresistoj, magiistoj kaj kun klaŭnoj dum cirka spektaklo. Vere, al infanoj plaĉas spekti ilin. Ĉu vi scias, kiuj bestoj povas roli en cirko? Kion vi konas pri ili? Jen kelkaj el ili:

Leono, “la reĝo de la bestoj”, estas efektive mallaborema kaj eĉ senkuraĝa. Ĝi vivas en densejo de tropika Afriko, ankaŭ en Arabio kaj en partoj de Nord- Okcidenta Hindujo. Atakante ĝi povas rapide kuri, ĝis 64 km en horo, je mallongaj distancoj.

Hundoj: ili estas ĉasmamuloj, kiuj kutime ĉasas en aroj kaj posedas fortan flarsenton por spursekvi la predon. Hundoj ankaŭ estas dorlotitaj bestoj,




kiuj bone gardas homojn. Ili ankaŭ helpas policistojn en iliaj laboroj kaj oni konsideras la hundon la plej bona amiko de la homo.

Leporoj kaj kunikloj rolas kun la magiistoj. Ili estas facile rekoneblaj pro longaj oreloj kaj malantaŭaj kruroj. La virkunikloj saltas unu super la alian kaj boksas per la antaŭaj piedoj. La idoj naskiĝas jam harkovritaj kaj kapablas kuri ekde la unua vivo-tago.



Zebro loĝas en Afriko. Ĝi estas sovaĝa besto, kiu vagadas tra la ebenaĵo en aroj kaj senĉese kaj vikle okulumas por rimarki la aperon de la plej granda malamiko – la leono. La surkorpaj strioj helpas kaŝi la zebzon inter altaj herboj kaj dum la krepusko, kiam ĝi kutime manĝas. Pro la strioj Romanoj nomis la zebzon “Tigro-ĉevalo”. – Ĉu vi iam spektis ludadon de tiuj bestoj en cirko?



Sovaĝa ĉevalo estas malgranda kaj dika besto, kun hirta pelto kaj ridiga kolhararo. Ĝi ankoraŭ vivas sur stepoj de Mongolujo. Tre simila ĉevalo estis la praulo de multaj el niaj dombestoj, ekzemple rajdĉevaloj, kurĉevaloj kaj ĉevaletoj. Indianoj ne vidis ĉevalon antaŭ la alveno de blankuloj el Eŭropo. Talentaj dresistoj plenaj je amo kapablas dresi tiujn belajn bestojn por roli en cirkaj spektakloj.



Kaproj kaj ŝafoj troviĝas en farmbieno. Tio ne ĉiam estis. Kiam niaj prauloj de la ŝtonepoko komencis farmi, ili dresis plurajn sovaĝajn bestojn kun la celo akiri




lakton, lanon, felon kaj viandon. En cirkoj ili rolas kun dresistoj kaj kelkfoje kun spritaj klaŭnoj .

Krokodilo: En la urbo Matanzas, (Kubo) la cirko “Atenas” estis la plej populara dum la 80-aj jaroj de la pasinta jarcento. En tiu cirko ses krokodiloj rolis. Ĉi tiuj grandaj, apudakvaj reptilioj estas troveblaj en varmaj landoj, laŭ la bordoj de lagoj kaj riveroj, en kiuj ili sentas sin “hejme”, egale kiel sur la tero. Ili havas torpedoformajn korpojn, piedojn kun membrano inter la fingroj por naĝado, kaj specialajn klipojn por fermi la orelojn kaj nazon dum subakviĝo. Tial krokodilo, kun buŝo malfermita, povas tiri sian viktimon sub la akvo kaj dronigi ĝin.



Ĉimpanzo sendube estas la klaŭno de la besta mondo kaj amuzas do tiujn, kiuj vizitas cirkojn. Ĉi tiu lerta kaj amikema besto rapide lernas, imitas kaj kapablas efektivigi rimarkindajn artifikojn kaj ludojn... – kaj eĉ solvi problemojn. Iuj homoj asertas, ke ĝi estas la plej lerta el la bestoj. Sovaj ĉimpanzoj vagadas, nutrante sin per fruktoj kaj trunketoj, eĉ kaptante bestetojn kaj ŝtelante el birdonestoj.



Elefanto estas komuna nomo por membroj de la familio elefant-edoj. Ili estas la plej grandaj surteraj mamuloj kaj vivas en Afriko kaj Azio. Ili havas longan fortan tuboforman nazon kaj dentegojn aŭ pikdentojn. La tri elefanto-specioj estas la afrika elefanto, la arbara elefanto kaj la azia elefanto. Ĉiuj aliaj specioj formortis.



Urso estas komuna nomo de mamuloj el la familio ursedoj. Tre multaj el ili estas

granda, plandmarŝa, preskaŭ senvosta, ĉionvoraj kaj ofte danĝeraj rabobestoj. Unu el la plej konataj kaj popularaj estas bruna urso. Ĝi estas inteligenta kaj dresibla besto, kiu tradicie rolis en cirkoj kiel favoratoj de la infana publiko. Ursojn eblas trejni danci, rajdi biciklon, paŝi sur la antaŭaj piedoj ktp.



En nia epoko bestdefendantoj atingis, ke laŭleĝe besto ne plu estas moveblaĵo, kiel tablo aŭ seĝo, sed vivanta estaĵo kiel homo. Sekve leviĝas voĉoj kontraŭ la ekspluatado de bestoj en cirkoj, ĉefe ĉar la vivkondiĉoj aŭ la transportkondiĉoj ne kongruas kun la natura eco de bestoj. Ekzemple leono ne havas spacon por kuri, se ĝi vivas en kamiono. Tio ofte okazas en malgrandaj cirkoj, dum en grandaj la estroj kaj dresistoj amas siajn bestojn kaj faras ĉion, por ke ili bone vivu. La sama tendenco ekzistas por malpermesi ĉasadon aŭ virbov-batalojn, dum aliaj argumentas, ke temas pri kutimo kaj eĉ kultura heredaĵo. Ĉiuokaze ni aplaŭdu dresistojn, kiuj kun amo kaj pacienco dresis (edukis?) siajn bestojn, kiel vi mem dresis vian ŝatatan kvarpiedan amiketon, kaj bojkotu la sovaĝulojn, kiuj batas la kunvivantan beston.

José de Jesús Campos Pacheco





Legu kaj ĝuu

Rubrikestro:

Małgosia Komarnicka

Pollando

malgosia.junaamiko@gmail.com



Laŭtleĝu al mi panjo, paĉjo, avinjo, avĉjo...

Ni ofte pensas, ke niaj infanoj por esti feliĉaj bezonas multe-kostajn kaj markhavajn ludilojn, vestaĵojn, aŭ frekventi tiajn infanĝardenojn kaj lernejojn, ĉar tiam ili fariĝos “homoj de sukceso”.

Infanj por feliĉo bezonas tute aliajn valorojn. Ili bezonas antaŭ ĉio amon, akcepton, sekurecon, agrablan pasigadon de la tempo kun la gepatroj, subtenon kaj kuraĝigon por esprimo de propraj sentoj kaj pensoj, sed ankaŭ klarigojn kaj respondojn.

Tiujn gravajn bezonojn ni povas plenumi per regula legado de la libroj al infanoj. Tiun sekreton antaŭlonge malkovris praaŭvino Irenka (sur la foto kun sia pranepino). Ŝi scias, ke ĉiuj momentoj, kiujn ni pasigas kune legante, estas vere esceptaj kaj havas nur samajn avantaĝojn. Tiuj momentoj bele konstruas intergeneraciajn rilatojn. Infanoj lernas estimon, toleremon kaj sentemon por bezonoj de aliuloj. La infanoj, kun kiuj ni lernas, multe pli bone disvolviĝas, estontece pli ofte legas kaj estas pli bone preparitaj al la vivo.



Klubo de bona libro

Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas dank’ al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn kaj

ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo, sendu al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de Juna Amiko.

Rekomendo

Por Biblioteko de Juna Amiko Irena Solarek, esperantistino kaj estraranino de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado el Pollando, rekomendas al vi la infanlibron *Reĝo Maĉjo la Unua* de Janusz Korczak.

La libron esperantigis Tomasz Chmielnik kaj bele tipografe kaj grafike prilaboris Jan Skonieczka.

Ĝi estis eldonita en Świdnik en la jaro 2009 kaj en la jaro 2010 en Belartaj Konkursoj de UEA ĝi ricevis la premion Infanlibro de la Jaro. Ĉi tiu eksterordinara libro rakontas pri infanaj pensoj, kiujn la aŭtoro mem volis efektiviĝi ekde sia infanaĝo.

La 10-jara reĝa filo Maĉjo, heredas la tronon kaj travivas multajn diversajn aventurojn, sed li ankaŭ enkondukas atenditajn reformojn. Li organizas Konstitucion, Infanan Parlamenton, Infanan Gazeton.

Li iom post iom komencas kompreni, kiel malfacile estas regi la landon. Li rimarkas, ke bono kaj feliĉo de la loĝantaro dependas de la ĝusta elekto de ministroj. La malgranda reĝo, regante kaj travivante diversajn situaciojn, lernas, ke ĉiu rajtas prezenti siajn opinion, koncepton, ideon, sed samtempe ĉiu devas esti respondeca, tolerema, nobla, memstara, kunlaborema, lojala, honesta...

Maĉjo estas tre pozitiva heroo. Li montras, ke oni devas respondi pri siaj decidoj. Li ne forkuras antaŭ konsekvencoj de siaj agoj.

Janusz Korczak, kies infana vivo ne estis feliĉa, volis, ke ni komprenu: la vivo ne estas fabelo, sed la homoj povas esti feliĉaj, se ili scipovas subteni ĝustajn infanajn revojn kaj estime kaj zorge trakti infanojn. Tamen la infanoj devas obei plenkreskulojn, ĉar ili havas pli da sperto kaj ili povas pli bone taksu multajn viv-situaciojn.

La libro estas unu el la plej konataj kaj popularaj libroj de Janusz Korczak. Ĝi estas skribita per simpla lingvo en saĝa kaj interesa maniero. Ĝi montras universalajn valorojn, kiuj permesas memori kio signifas – esti la homo.

La libro estas tradukita en pli ol tridek lingvojn, interalie en anglan, italan, ĉinan, Esperanton... Laŭ la libro estis faritaj filmo, animacia filmo, teatraĵo kaj opero.

En Szczecin (legu: Ŝĉecin), antaŭ la lernejo, kiu portas la nomon de Janusz Korczak, troviĝas la monumento de Reĝo Maĉjo la Unua.



Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo

Konkurso ne nur por junaj legantoj.

Ĉi-numere mi proponas viziti landon en Oceanio, Nov-Zelandon.

Tie naskiĝis kaj pasigis sian infanecon kaj junecon Stefan MacGill, la vaste konata esperantisto, eksredaktoro de *Juna Amiko*, kaj la kreinto de AMO-seminarioj. Li helpis al mi prepari la rubrikon kaj aldonis al mia titolo sian, belegan aldoniĝon – **Nov-Zelando, idilia subpacifika lando.**

Unue per kelkaj informoj konatiĝu kun la lando. Klopodu trovi la lokojn, menciitajn en la teksto sur la mapo, kaj poste tralegu la legendojn kaj faru la konkursajn taskojn.

Kio allogas min en Nov-Zelandon – idilian subpacifikan landon?

Nov-Zelando aŭ Novzelando (angle: *New Zealand* / maorie: *Aotearoa*) konsistas el du ĉefaj insuloj: Norda Insulo kaj Suda Insulo kaj el pluraj insuletoj kun Stuar-to-Insulo kaj Chatham-Insulo. Al Nov-Zelando apartenas ankaŭ dependaj teritorioj, kiuj estas aŭtonomiaj. La areo de la lando estas preskaŭ samgranda kiel Britio aŭ Japanio, sed kun nur 5 milionoj da loĝantoj.



La indiĝena popolo estas la maorioj, kiuj venis el iuj pacifikaj insuloj pli norde, per oko da longaj kanuoj, antaŭ ĉirkaŭ mil jaroj. Tiu vojaĝado montras nekredeblan gradon de navigaj kapabloj.

En la jaro 1642 la nederlanda ŝipveturisto Abel Tasman, kiel la unua eŭropano alvenis al Nov-Zelando, malkovrante ĝin. Tial la nomo de la lando devenas de la nederlanda provinco Zelando – kaj laŭ la maoria nomo *ao tea roa* ĝi probable signifas: “la lando de longa blanka nubo”.

En la jaro 1931 Nov-Zelando akiris sendependecon de Britio, en 1945 ĝi fariĝis membro de Unuiĝintaj Nacioj kaj du jarojn poste ĝi fariĝis membro de Brita Komunumo.

La plimulto de la novzelanda loĝantaro estas eŭropdevena kaj la dua plej granda popolgrupo estas maorioj. La oficialaj lingvoj estas la angla, la maoria kaj la novzelanda gestolingvo. La maoria lingvo fariĝis la oficiala ekde la jaro 1987 kaj de tiu momento oni povas lerni ĝin en multaj publikaj kaj privataj lernejoj. La novzelanda gestolingvo fariĝis la oficiala en la jaro 2006 kaj estas tutmonde la unua lingvo por surduloj.

La ĉefurbo de Nov-Zelando estas Velingtono – angle *Wellington* kaj maorie *Te Whanga-nui-a-Tara* aŭ *Pōneke*. La granda Velingtono estas la dua plej granda urbo en la lando kaj ĝi kuŝas en ĝia geografia centro. La ĉefurbo estas ankaŭ loka kultur- kaj art-centro. Velingtono estas la urbo de revoj, kiun ĉirkaŭas je unu flanko

ĉarma impona natura haveno kaj je la dua verdaj montoj. La plej granda urbo estas Aŭklando (angle *Auckland*, maorie *Tāmaki Makaurau*). Ĝi estas grava ekonomia, kultura kaj scienca centro. Tie troviĝas la plej granda universitato “The University of Auckland”. Queenstown (maorie *Tāhuna*) invitas ĉiujn, kiuj ŝatas frenezi, amuziĝi kaj ege malmulte dormi. Ĉi tie oni povas ŝipvojaĝi, flosadi, veturi per la plej kruta telfero en la lando, aŭ saltadi sur ŝnuro. Por admiri setlejojn de pingvenoj kaj albatrosoj valoras viziti la urbon Dunedin (maorie *Ōtepoti*), kiu ofte estas nomata “Edinburgo de Sudo”, ĉar ĝi estis fondita de skotaj koloniistoj.


Nov-Zelando estas insula lando, sed ĉefe montara. Ĝia granda parto estas vulkandevena kaj kelkaj vulkanoj estas ankoraŭ aktivaj kiel en la Blanka Insulo (maorie *Whakaari*, angle *White island*).

La pejzaĝo de tiu vulkan-insulo memorigas la lunan pejzaĝon kaj tial la insulo estas la plej bona turisma allogaĵo.

La plej malgranda nacia parko estas *Abel Tasman National Park* kaj la plej malnova parko estas la Nacia Parko Tongariro. En la centro de ĉi tiu parko estas tri aktivaj vulkanoj kaj multaj kultejoj de la maorioj, kiuj estimas la vulkanojn kiel sanktulojn.

Vizitante Nov-Zelandon oni interalie nepre devas viziti la gejsler-regionon en Rotorua (maorie *Rotorua-nui-a-Kahu*). La urbo estas grava centro de la maoria kulturo. En ĝi troviĝas unusola maoria teatro kaj maoria vilaĝo *Thermal Village*.

La plej alta monto de Nov-Zelando estas Aoraki aŭ Monto Cook (angle *Mount*




Cook), tre populara allogaĵo por turismo.

Nov-Zelando estas juna lando, ĉar antaŭe ĝi estis brita kolonio kaj ĝia kulinara arto dum multaj jaroj ne havis propran tradicion. La novzelanda manĝaĵo estas kunligo de ekzotiko kun eŭropaj kutimoj. Ĝi estas interesa kaj proponas novajn gustojn.

En Nov-Zelando Esperanto ekzistis jam ekde la komenco de la 20-a jarcento kaj ĝiaj esperantistoj ĉiam aktive kunlaboris kun la Esperanto-movado en Aŭstralio.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio estis fondita en la jaro 1910 kaj ĝi ĉiujare organizas Kongreson de Esperanto kaj ĉiun duan jaron kune kun Aŭstralio Esperanto-Asocio kaj dum kelkaj jaroj organizis trilandajn kongresojn, kune kun Indonezio.



Sumigante, Nov-Zelando estas negranda lando, sed ege pitoreske situata, kie ni admiras ĉiujn pejzaĝojn de la mondo kaj do interalie vulkanojn, gejserojn, lagojn, glaciejojn, tropikajn arbarojn, plaĝojn...

Vizitante tiun landon oni ne nur bele ripozas, sed oni ankaŭ havas multe da garantiaj allogaĵoj.

Nov-Zelando ofte estas nomata kiel “**dia ĝardeno sur la tero**”.



Legendoj

Stefan MacGill preparis unu legendon, kiu rakontas pri amo inter Tutanekai kaj Hinemoa.

Novzelandaj legendoj havas polineziajn devenon kaj kulturon, kiu inkluzivas centojn da legendoj kaj rakontoj, transirigitaj tra la generacioj per buŝa transdono. La plimulto restis en Norda Insulo kun pli milda klimato, pli simila al tio, kion ili kutimis. Sed du el la ok triboj setlis en Suda Insulo. Nia legendo tamen okazis sur Norda Insulo, apud la urbo Rotorua, kiu ĝis hodiaŭ ludas grandegan rolon en la protekto de maoria kulturo. Ĝuu la legendon!

La Nov-Zelanda legendo de Tutanekai kaj Hinemoa

La amrakonto inter Hinemoa kaj Tutanekai vivas eterne. Tio okazis apud la nord-insula urbo Rotorua. Hinemoa estis noble naskita maorio, sed Tutanekai estis juna nelegitime naskita batalanto. Tutanekai loĝis kun sia tribo sur la insulo Mokoia meze de lago Rotorua, dum Hinemoa loĝis sur la ĉeflando ĉe Owata. Hinemoa belis, kaj la patro dekretis, ke Tutanekai ne estas taŭga partnero. Sed ĉiunokte li sidis sur alta monto kaj ludis sian fluton – la ventoj portis la sonon al la amato, kies amo ĉiutage kreskis.



Unu vesperon Hinemoa decidis, ke la apartigo ne plu elteneblas. Sed ŝia popolo jam suspektis ŝiajn intencojn kaj kaŝis ĉiujn kanuojn (*waka*). Do, ŝi trovis ses kukurbajn ŝelojn kaj ligis ilin al sia korpo, por ke ŝi flusu. Ŝi malvestis sin kaj eniris la malvarman akvon, gvidata



trans la lagon per la fluta sono. Spite malfacilaĵojn, ŝi nokte atingis la bordon de la insulo kaj vizitis varman fonton por varmigi kaj revesti sin. Baldaŭ pasis servanto de Tutanekai, por plenigi ujon per freŝa akvo. Hinemoa kaŝis sian voĉon kaj demandis, por kiu estas celata la akvo. Je la respondo, ŝi trinkis el la ujo,

sed tuj poste rompis ĝin. La servanto reiris malplenmane kaj rakontis la okazintaĵojn. Tio okazis refoje, do Tutanekai venis al la akvejo kaj tie trovis sian amon, Hinemoa. Post tiu vespero la familioj de la paro rekonis la forton de ilia amo kaj benis la unuigon. Feliĉa fino por la paro, kies posteuloj vivas en Rotorua eĉ ĝis hodiaŭ. Hodiaŭ la insulo Mokoia estas neloĝata kiel sankta insulo de la tribo Te Arawa, kiu nun estas besta kaj birda protektejo.

Se Ŝekspiro konus la polinezian kulturon, eble la teatraĵo Romeo kaj Julieto rezultus alimaniere.

LA KONKURSA TASKO: Desegnu aŭ pentru bildo(j)n, kiu(j) bildforme prezentas okcitanajn legendojn. Kreu ankaŭ po 5 demandoj al ĉiuj partoj de la tuta rubriko.

La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko 'Konkurso – legendo' antaŭ la 30-a de novembro 2021 al la adreso Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej, ul. Kołłątaja 26A, PL- 50-007 Wrocław, Polska.



Stano Marček Unuiĝintoj por Paco

La 21-an de septembro 2021
(Internacia Tago de Paco) kvin
invititaj esperantistoj partoprenis
en Internacia Pacforumo “Unuiĝ-
intoj por Paco” en la hotelo Devín
en la slovakia ĉefurbo Bratislavo.

La forumo havas en sia statuto “subteni Esperanton kiel internacian lingvon de paco”. Stano Marček kaj Petro Baláž estis akceptitaj en la estraron kaj estis invititaj al kunlaboro.

La forumon enkondukis la iama prezidanto de Slovakio Ivan Gašparovič, post kio sekvis alparoloj de invititaj gastoj kaj reprezentantoj de politikaj partioj. La prezidanto de la forumo Eduard Chmelár parolis pri novaj celoj de la paca movado, Ilona Švihlíková, ekonomo, fondinto kaj koordinanto de la civitana asocio Alternativo Desube gvidis diskuton pri la temo “EU kiel pacaktivulo?”. Branislav Fábry, faka asistanto el Komenia Universitato en Bratislavo, kontribuis pri la temo “Rajto je paco kaj eblecoj de ĝia esprimo en la jura ordo”. Ján Čarnogurský, eksprezidanto de Slovakio Registaro parolis pri la bezono de nova sekureca arkitekturo. Petr Dulák, ekssekretario de Ĉeĥa Ministerio de Eksterlandaj Aferoj, iama konsulo de Ĉeĥa Respubliko en Francio, gvidis diskuton pri la temo “Eksterlanda politiko



en tereno de homrajtoj: hipokriteco de liberala imperialismo”. Svetozár Nadovič, eksgeneralmajoro, kiu estris foriron de sovetiaj armeoj el Ĉeĥoslovakio, parolis pri spertoj el nedezirata okupado de la lando.

La Pacforumo publikigis gazetaran komunikon, en kiu ĝi esprimis seriozajn zorgojn pri la kreskanta militarismo de Eŭropa Unio kaj la minaco al la monda paco. Konforme al la ripetaj alvokoj de la papo Francisko, ĝi alvokis al radikala redukto de armiloj kaj uzo de la ŝparotaj financoj por trakti la klimatan krizon. Ĝi subtenas la ideon de nedividebla sekureco por ĉiuj, sen ekzisto de militaj blokoj, laŭ la principoj de Pariza Ĉarto por Nova Eŭropo, akceptita en ĝia pintkunveno en novembro 1990, por la adopto de UN-Traktato pri Malpermeso de Nukleaj Armiloj.

La internacia iniciato “Unuiĝintoj por Paco” estis establita en Slovakio el iniciato de Eduard Chmelár, okaze de la 70-a datreveno de la fino de Dua Mondmilito la 6-an de majo 2015. Ĝiaj subskribintoj estis miloj da personecoj el 7 eŭropaj landoj, inkluzive de la iamaj slovakaj prezidentoj Michal Kováč, Rudolf Schuster kaj Ivan Gašparovič, eksa prezidanto de Ĝenerala Asembleo de UN Jan Kavan, subskribinto de Ĉarto 77 Petr Uhl, famaj artistoj kaj aliaj. Printempe ĉi-jare la forumo transformiĝis al Civitana Asocio, kies celo estas krei kulturon de paco kaj senperforto kiel la ĉefa antaŭkondiĉo por la paca konekzistado de ĉiuj homoj sur la tero.


Alessandra Madella

Dulingva libreto por infanoj

Cécilia kaj Maximilien Guérin: *La Eta Krokodilo kaj la Verda Stelo*. Parizo: L'Harmattan, 2021, 68 p.

Lastatempe aperis dulingva libreto por infanoj en la franca kaj Esperanto, nomata *Le petit crocodile et l'Etoile Verte / La Eta Krokodilo kaj la Verda Stelo*.

La aŭtoroj estas la francaj geedzoj Cécilia kaj Maximilien Guérin. Ŝi faris la ĉarmajn desegnaĵojn kaj ili verkis la rakonton de la eta krokodilo, kiu trovas esperon en verda stelo. Komence ni trovas la krokodilon en besto-ĝardeno, kie ĝi havas ĉion en sekura hejmo. Tamen ĝi ne estas libera. Sed, dank' al la stelo, ĝi kapablas fuĝi, malgraŭ sia timo de la nekonato. Ĝi trovas grandan birdon, kiu iĝas ĝia amiko. Kune ili iras al malproksima urbo, kie la krokodilo sukcesas por la unua fojo vidi neĝon. La rakonto estas poezia kaj ĉiuj povas trovi en ĝi siajn proprajn signifojn. Same la bildoj, blanknigraj krom la kolora kovrilo, estas tre simplaj. Ili estas speciale faritaj por stimuli la imagkapablon de la infanoj. Sed la tuto ankaŭ volas aludi al la historio de Esperanto ĝis la morto de Ludoviko Zamenhof. Oni povus ankaŭ legi ĝin kiel la enan vojon de ĉiu esperantisto. Oni sentas sin eble izolita en sia malkovro de la internacia lingvo. Sed oni ne plu sentas sin tiel kiam oni trovas aliajn homojn kun la samaj idealoj.



Tre interese estas, ke je la fino de la libreto troviĝas ankaŭ historieto pri la kreado de Esperanto. Ĝi fokusiĝas pri la figuro de Zamenhof. Ĝi montras precipe kiel liaj infanaj spertoj de malamo inter gentoj en la bazarplaco de Bjalistoko revigis lin pri lingvo, kiu povus esti uzata kiel ponto inter popoloj. Tiu enkonduko estas konciza. Sed ĝi povas certe vigligi scivolemon pri Esperanto en ne-esperantistaj legantoj kaj precipe en infanoj. Ili fakte povas respeguli

sin en la juna Ludoviko kaj povas revigi same plibonigi la mondon per siaj ideoj. Fine de la rakonto la krokodilo kaj la birdego vidas la neĝerojn iĝi neĝo kaj la stelo iĝi multe da verdaj steloj. En la sama maniero, ankaŭ tiu historieto de Esperanto donas la sencon, ke oni eniras en viglan mondon kun sia propra pasinteco kaj estonteco, kun multe da homoj kaj eblecoj. Pro tio ĝi finiĝas per la frazo "Bonan vojaĝon en Esperantio!" kaj oni

vere emus sekvi la etan krokodilon tien. La pariza eldonejo L'Harmattan naskiĝis en la sepdekaj jaroj el la katolika maldekstro, por pritrakti temojn de triamondismo, precipe rilate al Afriko. Sed ĝi havas ankaŭ gravajn rilatojn kun Esperanto. Meze de la naŭdekaj jaroj ĝi unue publikigis la originan francan version de *Le défi des langues (La defio de la lingvoj)* de la fama svisa esperantisto Claude Piron. Kaj en 2008 ĝi aperigis interalie la francan tradukon de *Ulica Zamenhofs (La Zamenhof-Strato)* de la pola samideana ĵurnalisto Roman Dobrzyński.

Do, estas tre bona novaĵo trovi ankaŭ tiun ĉi libreton inter la produktoj de la sama eldonejo. Ĝi fakte daŭrigas tiun tradicion. Maximilien Guérin, kiu profesie estas esploristo pri lingvistiko, jam aperigis kun L'Harmattan kolekton de rakontoj. Temas pri dudek originaj rakontoj, verkitaj en lingvo de parto de Francio, kiu entenas okcitanajn trajtojn. Krome, li publikigis kun

alia eldonejo tradukon de *La Eta Princo* al la volofa lingvo de Senegalio. Do, lia verko estas parto de tiu kruciĝo de kulturoj, kiun L'Harmattan volas reprezenti. Kaj ni povas vidi ankaŭ ilian brakumon de Esperanto en *La Eta Krokodilo* kiel parto de tiu fono.

Jam en 2013 L'Harmattan reeldonis la originan francan version de *Le Secret des iglous (Sekreto en igloj)* de Aimé Roche pri la inuitoj de Norda Kanado kun la aldono de Esperanta traduko. Ankaŭ en la kolekto "Jeunesse" (Junaĝo), en kiu aperas *La Eta Krokodilo*, estas aliaj dulingvaj libroj. Ekzemple, oni povas legi la leterojn de la fabela Baba Jaga en la rusa kun franca traduko. Sed *La Eta Krokodilo* estas speciala, ĉar ĝi naskiĝis rekte en la du lingvoj. Kaj ĝi estis rekte kreata kiel parto de la Esperanto-kulturo, kiel videblas ankaŭ de

la poezio de la rusa pioniro Roman Frenkel, kiu malfermas ĝin. La Franca Esperanto-Instituto kontrolis la tekston en Esperanto por atesti ĝian korektecon. Gravas por la aŭtoroj, ke scivolemaj infanoj povas interesiĝi kaj pri la franca kaj pri Esperanto. Kaj certe instruistoj povas pripensi pupteatraĵojn kaj aliajn enklasajn aktivadojn pere de ambaŭ lingvoj. Indas substreki la seriozecon de la eldona projekto. La aŭtoroj certe konscias, ke estas necese pliriĉigi kampon ĝis nun relative malmulte esploritan fare de esperantistoj, kiel la literaturon por infanoj. Sed la plej grava afero estas verŝajne la simpla sperto eniri en la rakonton kaj sekvi la etan krokodilon en ĝiaj aventuraj travivaĵoj, laŭ unu lingvo aŭ la alia kaj de unu bildo al la venonta. Tiel oni povas esperi malkovri la poezian signifon de Esperantio.

La 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj 2021

La 12-an de septembro 2021, en Vroclavo (Pollando), je la 16:00 horo, okazis Koncerto de la Premiitoj de la 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj.

Ĝi okazis en bela loko, en novrenovigita kulturcentro – Centrum na Przedmieściu. Ĉi-jare, pro pandemia tempo la organizanto, la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado decidis limigi nombron de la publiko kaj organizi la Konkerton de la Premiitoj surloke nur por invititaj gastoj. La gastoj sidis ĉe la speciale luitaj tabletoj, sur kiuj estis bongusta regalo.

Precize je la 16:00 al la kanto "Ĉu vi volas danci kun ĝojo kaj entuziasmo" dance komencis programon Gracie, dancantaj pliaĝulinoj, membrinoj de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (parto de ili lernas Esperanton). Poste

Małgosia Komarnicka, la kreintino de la kantfestivalo salutis la publikon en la pola kaj siajn salutvortojn al Esperanto tradukis JoMo, la konata franca esperantista muzikisto. Sekve Anna Wiatrowska, estraranino de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, mallonge prezentis la 5-jaran historion de la dancgrupo Gracie, kiu ĉi-jare festis sian jubileon. La gastojn entuziasmigis ankaŭ la kantanta JoMo, kiu kune kun dancistinoj plenigis la unuan artan parton de la programo.

La dua parto de la programo estis prezento de la filma versio de la Konkerto de la Premiitoj. Antaŭ la filmo Małgosia Komarnicka rekte estis konektita per zoom kun unu el la festivalaj jurianoj, James Piton el Brazilo, kiu rakontis al la pola publiko pri sia ĵuria laboro kaj respondis demandojn de Małgosia. La publiko havis eblecon spekti James sur la granda ekrano kaj konvinkiĝi, ke

Esperanto perfekte funkcias. En la filma versio de la Koncerto de la Premiitoj ne mankis informoj pri la belega urbo Vroclavo, ĉar ĝi estas naskiĝurbo de la kantfestivalo kaj ĝia organizado estas subtenata de la urbo. La spektantoj vigle reagis, rigardante filmon, ĉiun kanton premiante per laŭtegaj aplaŭdoj.

Post la filmo Maĝosia denove estis rekte konektita per zoom, sed ĉi-foje kun Julio Calegari el Dubajo kaj John Emmanuel Magessa el Tanzanio, kiuj rakontis, ke lastmomente ili decidigis partopreni en la kantfestivalo kaj kiamaniere tiel rapide preparis kune la kanton „Verda Lingvo Lernejo” kaj poste filmeton kun kantantaj infanetoj. Ili ambaŭ estis surprizitaj, eksciinte, ke ilia kanto ricevis premion kaj John eĉ ricevis specialan distingon pro preparado de la infankoruso. La publiko ankaŭ eksciis, ke la infanoj tre ekŝatis la kanton kaj ĝi fariĝis la himno de la lernejo.

En la lasta parto, dancantaj Gracie kaj JoMo daŭrigis la artan programon. Dum ĝi la publiko havis la eblecon ekkoni la invitajn gajnintojn de la Publik-premio kaj samtempe gajnintojn de la unua loko en sia aĝkategorio, la dueton „Anna Szczypek kaj Mihaelo Balicki” pro la kanto “Io stulta”. Tio estis okazo por prezenti speciale la ĉi-jare projektitajn vitralojn por la bezono de la 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Ĉiu vitralo estas alia kaj ĉiu estas mane farita de la projektantino Renata Gładysiewicz. La vitraloj estas en la formo de muziknotoj, muzikliniaroj

kaj dancistinoj. La ĉi-jarajn festivalajn diplomojn, dankesprimojn kaj invitilojn projektis Irenka Solarek.

La publiko estis tre impresita de la tuta aranĝo. La oranizantoj sukcesis perfekte kunigi ĉiujn partojn de la programo per speciale komponita vico de dancoj de Gracie, kies koreografio bonege harmoniis kun adaptita muziko de JoMo.

Honoran patronecon pri la 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj akceptis Jacek Sutryk – Prezidanto de Vroclavo, Bohdan Aniszczyk – Prezidanto de Komisiono pri Edukado kaj Junularo kaj la organizaĵoj: Universala Esperanto-Asocio, Rotary Esperanto-Klubo Brazilo, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, Malsuprasilezia Federacio de Neregistraj Organizaĵoj, EUROKKA, Juna Amiko, Varsovia Vento kaj pola retradio KSON.

Kelkajn horojn post la komenco de la aranĝo la filma versio de Koncerto de la Premiitoj aperis en la paĝaro de UEAviva (<https://www.youtube.com/watch?v=Eqr6imwOJc>).

En la nomo de la organizanto, Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, mi ankoraŭfoje elkrede gratulas ĉiujn partoprenintojn, precipe la premiitojn. Mi tre dankas al la juĝantoj pro ilia grava kaj ege malfacila laboro.

Mi jam invitas vin partopreni venontjare, en la 10-a, jubilea Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kiu okazos en julio 2022.

En la nomo de la organiza teamo
Maĝosia Komarnicka



Rubrikestro:
Elena Nadikova,
Esperanto-klubo “Betuleto”
Lernejo/Ŝkola 56,
pr. Traktorostroitelej, 38
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio
lenu_esperto@mail.ru




Kie troviĝas Paradizo...

Saluton, karaj legantoj!

Jam venis aŭtuno (aŭ printempo) kaj ni povas iom konkludi.

Finiĝas 2021 – la dua jaro de la severa pandemio. Ni jam al kutimiĝis longe hejmi kaj esperantumi virtuale.

Tamen jam aperis la unuaj “hirundoj”. Mi atentis fizikajn Esperanto-kunvenojn, kiuj poiome komenciĝas. Ilin vizitas la plej kuraĝaj esperantistoj – malgraŭ ĉiuj koronavirusoj. Ĉi-numere ni rakontos pri unu el tiuj “kuraĝaj” ĉeestaj kunvenoj. Temas pri RET – Rusiaj Esperanto-Tagoj-2021. Ili okazis de la 15-a ĝis la 22-a de aŭgusto en la suna Dagestano – la suda regiono de Rusio. Organizis ilin REU – Rusia Esperantista Unio kaj la inform-analitika Centro “Rakurso” el Maĥaĉkala kaj ĝia gvidanto, fama soveta kaj rusia esperantisto Abdurahman Junusov.



Respubliko Dagestano (Dagestan) situas en en la regiono Kaŭkazio, en ĝia orienta parto. La regiono havas areon de pli ol 50 miloj da kvadrataj kilometroj. La respubliko etendiĝas de la nordo al la suda 414 km laŭ la bordo de la maro Kaspijo.

Dagestananoj sincere opinias, ke ili loĝas en Paradizo. Kaj tio, fakte, veras. En Dagestano vi vidos severajn montojn, glatajn ebenaĵojn kaj teneran maron.

Kaspija Maro fakte estas ne maro, sed granda lago. Tamen pro la sala akvo ĝi nomiĝas maro. Dagestananoj tre estimas sian maron, salutas ĝin kaj petas donaci sanon kaj favoron. Kaspija Maro estas malpli sala ol, ekzemple, Nigra Maro. Tamen ĝi povas montri sian minacan karakteron tre rapide kaj neatendite. Dum RET-2021 kelkajn tagojn okazis ŝtormo. Kaj la partoprenintoj gaje batalis kun sufiĉe fortaj ondoj.

Dagestano havas longan historion kaj unikan kulturon. Oni nomas la regionon “La lando de 70 lingvoj”. Ĉu vi povas tion imagi, karaj legantoj? Pli ol 3 milionoj da loĝantoj parolas en 70 lingvoj! Dagestano



Sulaka kanjono. Foto: A. Salomatov

Europejskie
Centrum
Edukacji
Międzykulturowej



Eŭropa Festivalo
de Esperantaj Kantoj
Europejski Festiwal Piosenki Esperantckiej



ilei





Sanatorio "Kaspij". Foto: A. Salomatov

estas la plej multnacia respubliko en Rusio. En ĝi loĝas pli ol 60 nacioj kaj naciecoj. 30 el ili estas indiĝenaj. La plej multnombraj estas avaroj. Ĉiu popolo havas siajn proprajn morojn, kutimojn, lingvojn. Ofte okazas, ke du najbaraj vilaĝoj ne komprenas unu la alian, ĉar parolas tute diversajn lingvojn. Estas interese, ke nur 14 lingvoj de Dagestano havas ankaŭ skriban formon. Aliaj ĝis nun ekzistas nur en parola formo (*laŭ la datumoj de rusia vikipedio – E.N.*)

La loĝantaro en Dagestano plejparte konfesas islamon (pli ol 96 %). Ĉie vi povas vidi belajn moskeojn – de malgrandaj ĝis tre imponaj. Dum lastaj jaroj pli kaj pli da dagestana junularo aktive aliĝas al la islamaj tradicioj, reguloj, rememoras naciajn morojn.

Ĝenerale dagestananoj estas tre bonkora kaj gastema popolo. Ĉie oni vin renkontos kiel la plej estimatajn gastojn. Dum la tuta nia feriado tie ĉiuj lokanoj sincere interesiĝis, ĉu plaĉas al ni Dagestano, ĉu ni kontentas pri sia restado tie. Kaj ili volonte rakontis pri sia regiono, invitis denove viziti ĝin. Kaj ni – post nia ripozo tie – tutanime konsilatis al vi, karaj legantoj! Ĉiuj lokanoj ĝojos pri via vizito kaj ĉiam helpos okaze de bezono. Mi multe aŭdis kaj legis pri tio antaŭ mia vojaĝo. Tamen persone spertion estis, vere, tre agrable!

Por la partoprenintoj de RET-2021 estis preparita bunta kaj riĉa programo.

Matene okazis lingva kurso pri Esperanto, kiel kutime. Paralele funkciis somera klaso "Sciu do!" pri diversaj komputilaj kaj aliaj teknikaj aferoj. Estis organizita la seminario "Esperanto kaj amaskomunikiloj". Okazis diversaj prelegoj, konkursoj, foto- kaj pentraj-ekspozicioj, majstro-klasoj pri metioj.

"Amuza" parto de la kunveno konsistis el diversaj koncertoj, artaj vesperoj, intelektaj ludoj, bardkafejoj, diskotekoj k.a. Dum unu arta vespero la partoprenantoj spektis interesan filmon pri Esperanto en la vivo de la malgranda finna knabino Sigrid. Ĉar la kunveno okazis ĉe la maro, la partoprenantoj ne povis, kompreneble, eviti la viziton de Neptuno. La Caro de ĉiuj oceanoj kaj maroj amuzis RET-anojn per gaja festo-spektaklo kaj banado en la maro.

Tamen la RET-anoj ne nur amuziĝis. Dum la lastaj du tagoj okazis la tutlanda Konferenco de REU – Rusia Esperantista Unio. Tiu ĉefkunveno de rusiaj esperantistoj okazas ĉiujn du jarojn. La konferencanoj traktis diversajn demandojn pri la landa agado, pri ĝiaj problemoj, riskoj kaj perspektivoj. Estis elektita nova Estraro, oni akceptis novajn iniciatojn kaj proponojn. *Do, ni deziru al niaj samideanoj sukcesojn kaj fruktodonan agadon!*

Tre allogaj estis la ekskursoj. Ja Dagestano estas tre kulturriĉa regiono kun interesa historio. Unue menciindas,



Vizito en Derbento. Foto: A. Salomatov

sendube, la vizito al Derbento – la plej malnova kaj la plej suda urbo de Rusio. Ĝi aĝas jam 2000 jarojn! Kvankam multaj sciencistoj jam anoncas, ke historio de Derbento kalkulas 5000 jarojn, de kiam aperis la unuaj konstruaĵoj.

Nun okazas arkeologiaj esploroj en tiu kampo. La urbo bone konservas malnovan arkitekturon kaj havas neripeteban koloriton. Kronas la urbon la fortikaĵo Narin-kala. Ĝis nun konserviĝis multaj muroj, banejo, antikvaj putoj ene de la citadelo. Narin-kala gardas multajn legendojn kaj sekretojn. Pri ili eblas ekscii dum la interesaj ekskursoj. Dum la tagmanĝo en Derbento la partoprenantoj gustumis bongustajn dagestananajn manĝaĵojn: *hinkal-on*, *ĉudu-n* kaj aliajn.

Alia tre alloga ekskurso okazis al la ne malpli fama loko – al Sulaka Kanjono. Tiu kanjono de la rivero Sulako havas 53 kilometrojn da longeco kaj 1920 metrojn da profundeco. Do, ĝi estas la plej profunda kanjono en Eŭropo. Karaj legantoj, ĉu indas viziti ĝin por spekti la potencon de la naturo? Sendube, jes! *Kaj Esperanto helpas al vi en tiu aventuro!*

Kaj, certe, la RET-anoj vizitis la ĉefurbon de Dagestano Maĥaĉkala. Ĝi same konservas sian orientan koloriton, kvankam ĝi estas sufiĉe moderna urbo. Maĥaĉkala bele kadrumas la bordon de la Kaspija Maro.

Jen kia varia kaj interesa programo realiĝis dum RET-2021. Tamen apartan valoron, sendube, donacis la maro. La partoprenintoj povis la tutajn tagojn inter la programeroj pasigi ĉe la bela plaĝo. Ja la sanatorio "Kaspij", kie okazis la kunveno, situas ĝuste sur la marbordo. La RET-anoj senlace banis sin en tre karesa kaj varma maro. La temperaturo de la akvo estis ĉiam 27-30 °C. La vetero ankaŭ favoris al esperantistoj kaj tute ne ĝenis per neeltenebla varmeco. Ĉiam blovis agrabla venteto, la suno ofte kaŝis sin malantaŭ nubetoj.



La REU-Konferenco. Foto: A. Salomatov

Do, la restado dum RET-2021 estis tre komforta kaj saniga.

Ni, la partoprenintoj, tre dankas la organizantojn kaj aparte "la ĉefulon" Abdurahman Junusov pro belega ripozo kaj interesa aranĝo. Forveturante, *ni ĉiuj forportis en niaj koroj ankaŭ grandan dankon al la gastema respubliko kaj al nia lingvo Esperanto! Ni firme certas, ke Esperanto iĝos la 71-a konstanta lingvo de la suna kaj bonkora Dagestano!*

Interkultura mondo esprimas koran dankon al ĉiuj organizantoj de RET-2021 kaj persone al Aleksej Salomatov pro la disponigitaj belegaj fotoj.

Por lernemuloj:

Nivelo 1. Rerakontu la tekston (ĝian parton) laŭ la alineoj.

Nivelo 2. Respondu la demandojn:

1. Kie situas Dagestano?
2. Kiel oficiale ĝi nomiĝas?
3. Kiujn geografiajn pejzaĝojn oni povas spekti en Dagestano?
4. En kiom da lingvoj parolas la loĝantoj de Dagestano? Kaj en kiom da lingvoj ili skribas?
5. Kiom da naciecoj loĝas en Dagestano?
6. Kiuj vidindaĵoj estas la plej konataj en Dagestano?
7. Kial oni konsideras Kaspij'on maro?

Nivelo 3. Rakontu, kiujn lokojn en la mondo vi ŝatus viziti kaj kial.

Mireille Grosjean

Kiom stultan ideon mi havis...

Ĉu vere malĝusta dato?

Estas kutimo, ke Universala Kongreso de UEA (UK) okazadu en la lasta semajno de julio. En 2000 ĝi okazis en Tel-Avivo en Israelo. Mi partoprenis.

Okaze de tiu evento estis proponitaj kiel kutime diversaj ekskursoj. Mi partoprenis ekskurson, dum kiu eblis viziti diversajn lokojn, inter aliaj la urbon Betlehemo, *Bet-Lehem*. Tiu urbo situas en palestina teritorio, ĉirkaŭ dek kilometrojn sude de Jerusalemo. Ĝi estas fama en Biblio, ĉar laŭ la kristana tradicio Jesuo naskiĝis tie. Konsekvence multaj kristanoj el la tuta mondo faras pilgrimadon al *Bet-Lehem*.

Ni alvenis per aŭtobuso. La buso trovis parklokon en giganta domo por tiaj busoj. Do temas pri turisma loko. Poste ni devis grimpi laŭ mallargaj stratoj kaj multaj ŝtuparoj. Finfine ni atingis la preĝejon de la Naskiĝo, kiu situas sur montopinto. Ni eniris kaj vidis katolikan preĝejon kun multe da seĝoj en vicoj en tre hela lumo. Flanke de tiu hela preĝejo kuŝas alia preĝejo, kie regas tute alia etoso: malhelo kaj manko de seĝoj. Temas pri ortodoksa preĝejo. La du preĝejoj kuŝas unu ĉe la alia, laŭ la longeco de la du konstruaĵoj estas gigantaj arkaj trairejoj, por paŝi de unu al la alia. En la malhela preĝejo eblas vidi la precizan lokon, kie laŭ la tradicio Jesuo naskiĝis. Do sentiĝas arda pieco ĉe la pilgrimantoj, kiuj miksiĝas kun aliaj vizitantoj kaj turistoj.

Mi estis en la hela preĝejo, poste iris en la malhelan, vidis la altaron de tiu sankta loko kaj revenis al la

hela sanktejo. Aŭdiĝis kantoj. Sidis tie granda grupo de homoj en kantado. Staris meze ilia pastro. Belega koncerto de piaj pilgrimantoj. Laŭ la vestaĵoj mi venis al supozo, ke tiu grupo venis el Sud-Ameriko. Mi konis la kantojn, temis pri kristnaskaj kantoj, la melodion mi povis preskaŭ kanti kun ili.

Tiam venis al mi ideo: tamen ni estas en julio! Kial kanti kristnaskajn kantojn en julio? Ili eraras! Post kelkaj sekundoj venis al mia menso la malkovro, ke ne la dato kongruas, sed la loko kongruas! Taŭgas kanti kristnaskajn kantojn en *Bet-Lehem* tra la tuta jaro! Mi ne forgesos tiun impreson, ĉar ilia fervoro estis forta kaj ilia kantado belega; mi supozis, ke ili eble ŝparis dum dek jaroj por fari tiun longan vojaĝon al la Sankta Lando. Estis tre grava tago por ili. Ne temis pri kuranta turista grupo, temis pri ardaj pilgrimantoj, disĉiploj de tiu, kiu naskiĝis tie. Ili ĝuis la sidadon tie kaj restis tie... la tutan tagon... Mi ne scias, mi devis foriri kun mia grupo.



Renée Triolle

Bluĝinzoj

Bluĝinzo estas la plej uzata kaj la malplej ekologia pantaloneo.

En Parizo, dum aŭtuno 2021, okazis en Scienca Domaro ekspozicio pri bluĝinzoj. El ĝi mi transdonas informojn al la legantoj de *Juna amiko*. Nuntempe ĉiujare estas produktitaj 2,3 miliardoj da bluaj pantaloneoj, kiuj furoras ĉie en la mondo.

Historio

Historie ili naskiĝis en Kalifornio kaj estis la laborpantaloneoj de la orserĉantoj. Antaŭ 150 jaroj ili estis faritaj el tendoŝtofo, do rezistanta, neforuzebla ŝtofo, kiun vi povas senprobleme surhavi eĉ se vi laboras kun gamboj en la akvo. La nomo venas el la franca urbo Nimes (romia



urbo en suda Francio) kaj tiu kotona teksaĵo famiĝis ĉefe post la dua mondmilito. Tiuj bluaj pantaloneoj iĝis simbolo de ribelo inter la junuloj, kiuj, kontraste al la patroj en kostumoj, surmetis nur pantaloneojn. Ili iĝis senseksaj: ankaŭ virinoj surmetas ilin. Sed dum la lastaj 80 jaroj ili uziĝas ne nur por labori aŭ vojaĝi, sed ankaŭ ekzemple vespere por viziti teatron! Ekzistas modo: pli-malpli largaj, pli-malpli bluaj ktp.

Produktado

En la ĉina urbo Xintang estas produktata unu triono de la 2,3 miliardoj, tio signifas 73 ĝinzoj ĉiusekunde! Ĉiutage 600 000 km da fadenoj (tio estas longeco egala al duono de la terglobo) estas teksataj. Por produkti unu ĝinzon necesas 1 kg da kotono, do 7 kg da insektomortiga kemiaĵo + 2kg da sterkaĵo, aldoniĝas 11 000 litroj da akvo (por kreskigi la kotonon kaj produkti la ŝtofon), plus 25 litroj da petrolo, kaj eliras 5 kg da CO₂. Aldonu energion por transporti la varon ĝis via urbo...

Poluo

Kotono konsistigas 23% de la teksaj fibroj, produktitaj en la mondo, kaj ĝia kultivado kovras 5% de la kultivatataj areoj en la mondo. Ĝi uzas 25% de la insektomortigaj kemiaĵoj. Sed ĉefa poluo



venas el la koloro. Origine, indigo venas el planto, sed ne plu estas uzata la natura tinkturado, oni devas ĝin produkti. Tiu bluo venas el kianido kaj formolo (akva solvaĵo de metanolo), sed tiuj kemiaĵoj ne solviĝas en akvo, necesas aldoni sulfiton kaj sulfaton. Tunoj da kemiaĵoj estas ĵetataj en riverojn, sen ia pritraktado – kaj poluas. Por akiri diversajn tonojn de bluo, uziĝas speciala acido.

Ne estas kontroloj; se estas, la fabriko estas translokitigata en landon (aŭ regionon), kie ne ekzistas tiuj sankontroloj! Produktado de unu kilogramo da indigo necesigas 1 tunon da petrolo, 9 kilogramojn da toksaj solviloj kaj 1 000 litrojn da akvo. Nuna tekniko por variigi la koloron estas uzado de lasero. Ni ne forgesu la transporton: ofte kotono venas ekzemple el Italio, estas ŝpinita en Turkio, teksita en Ĉinio, kudrita en Bangladeŝo kaj lavita en Egiptujo! Ni aldonu, ke la zipoj, butonoj aŭ kudrofadenoj venas el aliaj landoj.

Homaj rajtoj

Ne nur la naturo estas tuŝita de la produktado, sed ankaŭ la homoj ege suferas pro ĝi. Ofte la pantalonoj estas produktataj en landoj, kie oni ignoras la minimumajn homajn rajtojn (rajto je ripozo, je deca salajro ktp). Plej ofte virinoj laboras ĉi-kampe: en Bangladeŝo 9 el 10 laboristoj estas virinoj (ne parolante pri infanoj...); ili laboras 12 horojn tage dum 6 tagoj kaj ricevas magran salajron: la kvaronon de la tiea minimuma salajro! Do ne forgesu, kiam vi aĉetas ĝinzon, ke vi ekspluatas virinojn aŭ infanojn, kiuj havas nek laborkontrakton nek socian helpon. Kaj ili spiras kemiaĵojn dum la tuta tago, laboris en akvo, manipulis sablon, por ke viaj ĝinzoj aspektu malnovaj!

Ĉu ideala solvo?

Supozeble neniu pretas rezigni pri tiuspeca pantalono, ĉar ĝi estas tre praktika: ne ĉifoniĝas, ne rapide mal-

puriĝas, surmetiĝas somere kaj vintre. Sed se vi konscias pri la malbono, kiun produktado kreas por la planedo, vi povas redukti vian kontribuon al tiu malbonaĵo. Ekzemple ne sekvi modon, surmeti ilin ĝis foruzo (en Francio 70% de la vestaĵoj neniam estis surmetitaj aŭ maksimume 7 fojojn! – pro tio en la mondo 2,6 tunoj da ŝtofoj estas enfosigataj ĉiusekunde), kaj inventi pluan uzon: el longa pantalono fari mallongan, aŭ sakon, aŭ ion alian: mi mem fabrikis lamp-ŝirmilon por la teraso. Do pripensu.

Renée Triolle



Arkokrucenigmo

Kaŝitaj estas kvar nomoj de manĝeblaj naturproduktoj.

Dekstren al la centro:


1 – Virnomo (de multaj reĝoj). 2 – Granda ronda ligna vazo. 3 – Metala vesto de aŭtomobilo. 4 – Dolĉa tropika frukto. 5 – Apudmara. 6 – Publika diskutejo. 7 – Inklino al timo. 8 – Ŝlosaparato. 9 – Specialisto. 10 – Estonto. 11 – Ĉeno por malliberuloj. 12 – Komerco, entreprenadi por monprofito. 13 – Granda dancamuzo. 14 – Malgranda surbicikla aŭ surĉevala seĝo. 15 – Rajto je laŭdo aŭ rekompenco. 16 – Disket-forma fermilo de vestoj.

Maldekstren al la centro:

1 – Kvalito, faranta ion admirinda, plaĉa. 2 – Rapidege paŝi. 3 – Batita persono. 4 – **La unua kaŝvorto**. 5 – Nobela titolo. 6 – Kapkovrilo. 7 – Desinfektilo (C6H5/OH/). 8 – **La dua kaŝvorto**. 9 – Longnaza heroo en dramo de E. Rostand (fonetike). 10 – Parto de kruro. 11 – Agema, labor-ema. 12 – **La tria kaŝvorto**. 13 – Vivejo de la animaloj. 14 – Blankŝela foliarbo. 15 – Parteto de sago. 16 – **La kvara (lasta) kaŝvorto**.

Premion pro la solvo el la antaŭa numero gajnis: Cosetta Barandi el Italio.

El la libro 107 krucenigmoj en Esperanto de Stano Marček



Solve el la antaŭa numero: PACO KAJ AMIKECO

1. PARTIKO
2. TOMATO
3. KAROTO
4. KUKUMO
5. ANANASO
6. TUGLANDO
7. FRAGO
8. POMO
9. KIVITO
10. MELONO
11. CITRONO
12. AVOKADO



Juvelo en la suda pacifiko⁽²⁾ – ni ne hastas

Ni forlasas la plej altan monton de Nov-Zelando kaj pasas belajn lagojn por eniri la montpasejon Haast.

Tiu pasejo ricevis sian nomon laŭ la germana geologo kaj esploristo Julius von Haast. El la tri montpasejoj inter okcidento kaj oriento de Suda Insulo tra la alpoj, la pasejo Haast estas la plej sendeklava.

Ĝi entenas belajn lokojn, kiuj meritas viziton. La unua estas Tondra Akvofalo.



Vort-klarigoj: *Montpasejo:* Loko kie eblas transiri de unu flanko de montoĉeno al la alia. *Geologo:* Persono, kiu studas rokojn kaj la teron. *Setlado – alveno de homoj, kiuj okupas terpecojn kaj tipe konstruas urbetojn aŭ vilaĝojn.*

La rubrikon
prizorgas:
Stefan MacGill



Pendoponto por maksimume 10 personoj



En la alpoj kaj la okcidenta marbordo falas multa pluvo. Dua vidindaĵo estas la Blua Baseno, kiu prenas tiun koloron pro sulfatoj en la akvo. Tio postulas promemon tra la arbaro de ĉ. 30 minutoj, dum kiu oni devas promeni laŭ du pendopontoj, kiuj havas severajn pezo-limigojn, kiel klarigas la averta afiŝo. Konvenas piktogramoj, ĉar ĝis la alveno de la pandemio, la regiono altiris ege multajn turistojn, multaj el Azio, kies rego de la angla lingvo estas ne nepre flua.

Post la traĵo de la montpasejo ni atingis la okcidentan marbordon kaj zorge pluiris al la urboj de la okcidenta marbordo, areo riĉa en historiaj lokoj pro la frua eŭropa setlado kaj la or-febro, kiu logis multajn homojn. Inter tiuj urboj ne mankas naturaj belaĵoj. Sed tio restu por la sekva numero de *Juna Amiko*.



Blua Baseno, fotita de la mallarga pendoponto

Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

Aŭstralio: Aŭstralia Esperanto-Asocio, G. P. O. Box 2122 Melbourne 3001; *info@esperanto.org.au*. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; *aon.913548977@aon.at*. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; *financoj@fel.esperanto.be*. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; *belabutiko@esperanto.org.br*. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; *eab@esperanto.org.uk*. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; *mrpv@interpres.org*; *ilei@espereto.com*. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; *polnickypavel@seznam.cz*; *cea.polnický@quick.cz*. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; *strigo@esperanto.cl*. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; *arko.gong@qq.com*. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; *arnecasper@yahoo.com*. **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; *ahto.siimson@esperanto.ee*. **Finnlando:** Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as 10, FI-28430 Pori; *paula.niinikorpi@gmail.com*. **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; *esperantofrance@esperanto.org.net*. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; *wolfgang.schwanzer@esperanto.de*. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; *zsofia.korody@esperanto.de*. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid; Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell; *sandra@esperanto.cat*. **Hungario:** Jozsef Nemeth, Fo u. 41/5, HU-8531 Ihász; *jozsef.nemeth@gmail.com* (por superaj membroj de ILEI); Stefan MacGill; *stefan.macgill@gmail.com* (por simplaj abonoj). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; *esperanto@isl.is*. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; *saviogp@netvision.net.il*; *esperantisto@live.com*. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; *esperoenparmo2020@yahoo.com*. **Japanio:** Japania Esperanto-Instituto, Japania filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; *esperanto@jei.or.jp*. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; *marija@hes-keu.hr*. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; *irenaa@takas.lt*. **No-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, *ryangomez@extra.co.nz*. **Pakistano:** Jawaidd Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 Kraków; *mtatara@gmail.com*. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; *asocio@esperanto.pt*. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; *sezonoj@mail.ru*. **Slovakio:** Peter Baláž, Vítazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; *petro@ikso.net*. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Sten Svenonius, *fidinda@outlook.com*. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; *ch_scheidegger@bluewin.ch*. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; *rezamenhof@yahoo.com*. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; *esp.togo@cafe.tg*. **Usono:** Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103; *eusa@esperanto-usa.org*. **Por vidhandikapuloj:** Vjačeslav Suslov; *gloro59@yandex.ru*. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** *ilei.abonoj@gmail.com*.

